8-a JARO, N-o 390

LEIPZIG, 30. / 6. 1932



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

DEPORTIĜO DE FREMDULOJ EL USONO.

Dum multaj jaroj reklamita panaceo kontraŭ usonaj malbonoj estis forpelo al fremduloj. La nuna krizo treege helpis akceli la aferon. Sed ankoraŭ restas ses milionoj da alilandanoj en Usono. Eble pro tiu scio la ĉefo de enmigrado en la Departemento de Laboro en la raporto por 1931 diris: „La tasko de dompurigo estas praktike nur komencata."

Celo k agado.

Estas interese kompari la celon k agadon de l'labordepartemento. „La celo de l'Departemento de Laboro estos kuraĝigi, antaŭenigi, k disvolvi la bonstaton de l'salajroricevantoj en Usono, plibonigi iliajn laborkondiĉojn k plialtigi iliajn oportunojn trovi profitdonan okupon."

Raportas la Usona Unuiĝo por Civilaj Liberoj: „Drastaj atakoj kontraŭ la rajtoj de fremduloj daŭris en Novangliaj tekscentroj, dum kiuj la Departemento de Laboro k la loka polico kunagadis ĉe arestoj al ekster Usono naskitaj laboristoj por rompi strikojn." Denove: „Multaj alilanduloj estis deportitaj sole pro membreco en la kompartio ..."

La enmigrada ĉefo laboras sub la gvido de „Deportado-Doak" (W. N. Doak), la ĉefo de l'Usona Departemento de Laboro. Doak estas ano de l'Amerika Federacio de Laboro, kiu tutkore subtenas la agadon de sia eminenta membro. La A. F. de L. deklaras opinii, ke deportado estas rimedo kontraŭ senlaboreco. Ankaŭ troviĝas radikaluloj, kiuj opinias same. Ŝajnas, ke la konstanta kontraŭfremdula agitado en la burĝaj gazetoj, kiel tiuj de Herst (Hurst), ankaŭ ilin influas. Aliaj propagandiloj efikaj en „la sankta milito" estas la radio, teatro, preĝejo, afiŝoj, ktp. „Forpelu la fremdulojn," oni blekas „k donu iliajn okupojn al civitanoj!" Ĉio en la servo de l'„plej grava tasko" – deportado de alilandanoj.

Vico da laboristaj dungejoj estas kondukataj de l'labordepartemento. Ĉu ili malhelpas la mastrojn malaltigi la salajrojn? Tute ne. La mastroj malaltigas salajrojn k maldungas laboristojn laŭ sia plaĉo. La dungejoj de Doak eĉ akcelas tiun epidemion. Se laboristo protestas aŭ rifuzas akcepti la kondiĉojn, lia nomo baldaŭ troviĝos sur la „nigra listo" k li ne plu ricevos laboron tie. Tamen tio ne estas ega malfeliĉo, ĉar iu ajn vivmaniero superas tiun de laboristo, kiu laboras per helpo de usonaj dungejoj. Relative malmultaj trovas laboron per ilia helpo.



Senlaboruloj, plej multe meksikianoj, en la plej malnova parko en Los Angeles.

Kelkaj statistikoj.

En 1920 Usono deportis 2 726 fremdulojn; en 1931 la nombro atingis 18 142. Al aliaj 11 791 oni permesis forlasi la landon „volonte" k 722 tuj vojaĝis eksterlanden, kiam la enmigradaj instancoj ordonis ilin aresti. Ĉi-lastaj, laŭ leĝo de 1929, kune kun la deportitoj ne rajtas iam denove eniri Usonon. Ili estas forpelitaj por ĉiam. La deportitoj en la fiska jaro 1932, depost la 1. julio 1931, dum la sep unuaj monatoj sumiĝas je 10 771, tio estas 746 pli ol en 1930 k 1 187 pli ol en 1931, dum la samaj monatoj. La nombro da deportatoj tial ĉi-jare plej certe atingos pli ol 20 000. Ne malpli ol 150 000 iel implikiĝas ĉiujare en la deportada manio k inter ili troviĝas multaj civitanoj. La nuna aktiveco estas ebla pro pligrandigitaj monsumoj alproprigitaj tiucele. Se pluraj ne estis deportitaj, tio okazis nur, ĉar mankis mono en la labordepartemento.

Centoj da miloj da homoj penas trovi rimedojn por forlasi Usonon. Jam antaŭ monatoj la gazetoj sciigis nin, ke pli ol 100 000 estis enskribitaj ĉe „Amtorg" en Nov-Jorko. Ĉiuj deziras eniri Sovetion por labori. Multaj spite la terura krizo trovas rimedojn, ĉu per helpo de parencoj eksterlande, aŭ aliel, k elmigras. Dum la sep monatoj komence de 1. julio lastjare, 67 154 fremduloj faris tion; samtempe nur 23 955 enmigris.

Falsa propagando pri libero, prospero ktp. altiris multajn al Usono en la pasinto –, sed ĉi tie ili ofte trovis nur sklavecon, malriĉon, k krome ili ofte perdis sian sanon laborante por la avidaj usonaj mastroj. La fremduloj ĉiam devas fari la plej malgrablan laboron k estas plej malalte pagataj. Tio estas precipe vera pri tiuj, kiuj ne scias la lingvon k kies haŭtkoloro ne estas „blanka". Multaj, kiuj ŝparis iom da mono, jam diversmaniere ĝin perdis aŭ ĝin foruzis dum longaj monatoj da senlaboreco. La plimulto el la bankrotintaj bankoj k similaj institucioj estas tiaj, kiaj tenis la monon de malriĉuloj. Havaĵoj ĉiuspecaj multe nevaloriĝis k

fariĝis preskaŭ nevendeblaj pro manko da aĉetantoj.

Troviĝas multaj alilanduloj en la Kaliforniaj deviglaboraj tendaroj. En 326 tendaroj inspektitaj dum aprilo estis sume 5 366 personoj. Inter ili troviĝis 3 076 filipinanoj, 1 174 meksikianoj, k 710 japanoj. Ĉiuj devas labori sensalajre. Usonnaskitoj ankaŭ troviĝas en tiuj tendaroj.

Persekuto k rezultoj.

La krizo trafis plej severe la fremdulojn. Pli k pli oni malebligas al ili honeste perlabori siajn vivrimedojn. Multloke ili ne plu rajtas labori. Ekzistas leĝoj malpermesante al ili labori. Ekzemple ĉe laboro publike pagata. Sed okazas, ke tiuj leĝoj trafas ne nur tiujn, kiuj tiom malsaĝe elektis esti naskitaj eksterlande, sed ankaŭ la saĝulojn. La Kalifornia ŝtatestro fakte uzis la terminon „fremduloj“ pri en Usono naskitoj, kiuj eniris Kalifornion por serĉi laboron. Por trovi laboron oni devas alporti dokumenteton montranta, ke oni estas enskribita kiel voĉdonanto en la loko, kie oni serĉas laboron. Por havigi ĉi lastan necesas loĝi en la loko dum tempo fiksita per leĝoj – sufiĉe longe por iafoje ĝis morto malsati.

Spite la sovaĝaj baroj ĉiuspecaj la Ŭikerŝam (Wickersham)-raporto neas, ke fremduloj estas pli krimemaj ol enlandanoj, kiel asertas la kontraŭfremdulaj propagandistoj.


Senlaboreco konstante kreskas. La sovaĝa persekutado ne helpas. Nur stultuloj vere kredas, ke la problemo tiel solviĝas. Tamen la usonaj regantoj, kiuj modeste konfesas, ke ili „gvidas la mondon“, ĉiam nutras siajn regatojn per tiaj stultaĵoj.

Pri forpelo al alilandanoj diris virino, kiu gajnas siajn vivrimedojn per luo de ĉambroj en kvartalo, kie antaŭe loĝis multaj meksikianoj k italoj: „Depost kiam oni cirkuligis petskribon devigante ĉiujn foresti la stratojn je la 21-a horo k oni forpelis la fremdulojn, ĉi tiu kvartalo tute stagnis, k nun mi estas la sola loĝanto en ĉi tiu domo. Tio, anstataŭ helpi, nur malbonigis nian staton.“

Se oni juĝas laŭ la agado de l'instancoj, fremduloj havas neniajn rajtojn en Usono. Tuj post aresto la enmigradaj agentoj kuraĝigas, sub kondiĉoj multe pli seriozaj ol la arestito suspektas, fari asertojn, kiuj poste helpas la enmigradan inspektiston plenumi sukcese sian taskon kiel juĝisto, ĵurintaro k persekutisto. Deportotoj estas ĵetataj en karceron kune kun krimuloj. Ofte ili restas tie longajn monatojn, dum la instancoj aranĝas la aferon.

Estas naŭze observi ilin plori krokodilajn larmojn pri disrompiĝo de hejmoj en Sovetio, dum ili mem faras precize tion, per la plej kruelaj rimedoj imageblaj, en sia propra lando. „Edzoj estas disigitaj de siaj edzinoj, gepatroj de siaj infanoj, pacaj, laboremaj, honestaj familioj rompitaj; virinoj k infanoj forpelitaj al la filantropiaj organizoj, ofte nur pro tio, ke pro sia nescio ili teknike malobeis la enmigradan leĝon.“

La instancoj malobeas la usonan konstitucion, kiam ili rabiradas k arestas sen arestletero. Ili agas kvazaŭ reĝoj, kiuj ne povas erari. Laŭ la Ŭikerŝam-raporto ilia agado estas „despota, tirana k subprema.“ Oni komparis la agadon al la krueloj de l'mallumaj epokoj. „Sensaciaj rabiroj estis kondukataj k fremduloj k civitanoj estis detenataj neleĝe, dum ili esploris kontraŭe al la konstituciaj rajtoj de l' viktimoj.“



Spitante al krizo k faŝismo

ĉiu SAT-ano klopodu ĉeesti de la 6.-11. aŭgusto la XII-an KONGRESON DE SAT EN ŜTUTGART!

Ruĝa literaturo.

Ofte oni povas vidi sur la stratoj en usonaj urboj personon haltigatan de enmigrada aŭ alia agento de „leĝo k ordo“. Sen iuj klarigoj ili komencas mokdemandi k esplori diversmaniere. Ili estas neuniformitaj k la haltigito ne povas scii kun certo, kiuj ili estas. Oni divenas tion. Unu el la plej ordinaraj demandoj ne estas: „Ĉu vi portas pafilon en via poŝo“, sed „Ĉu vi portas ruĝan literaturon en via poŝo?“ Ambaŭ estas krimoj, sed la lasta la plej grava k sufiĉa kialo por deportado. Personoj opiniantaj, ke ĉio ne status kiel eble plej bone en Usono, estas danĝeraj.

Rampaĵuloj abundas. Ĉu la enmigradaj instancoj ricevas sciigojn pri alilandanoj anonime aŭ aliel, ne gravas. Filantropiaj, frataj, religiaj organizoj, ktp, ĉiuj liveras utilajn sciigojn. La deportadaj leĝoj estas rimedoj, per kiuj fihomoj ekster k inter la enmigradaj instancoj gajnas monon neleĝe. Multaj fremduloj fariĝis viktimoj de minacpostulantaj homoj. Fremduloj vivas ofte en konstanta timo, ke iu fripono, sen ilia scio, denuncos ilin ĉe la instancoj k ke ili pro tio estos arestataj k sekrete deportataj.

Ĉie oni nuntempe registras sub diversaj pretekstoj sciigojn pri ĉiu k ĉiuj. Por akiri ian ajn laboron necesas doni sian tutan vivhistorion. Eĉ por havigi pelvon da supo en la suplinio, tio estas postulata, krom labori. „Ni ne plu povas,“ diris laboristo, „eniri publikan necesejon ne estante prilaborataj per demandoj pri nia deveno.“

Sovetio – rifuĝejo.

En la ŝtato Ŭaŝingtn (Washington) antaŭ nelonge la enmigradaj instancoj kune kun policistoj, ĉe la fino de proceso kontraŭ kelkaj komunistoj, mokdemandis la ĉeestantojn laŭvice. Kvindek estis kondukataj al la urbodomo k submetataj al severa inkvizicio. Kelkaj el ili estis malliberigataj k kiam iliaj amikoj iris al la karcero kun kaŭcia mono, la instancoj ilin sciigis, ke la malliberigitoj ne havos permeson forlasi la karceron kontraŭ kaŭcio k eĉ, ke neniu rajtos ilin alparoli.

Ĉina studento en la Berkli-a (Berkley)-universitato, Kalifornio, verkis tezon pri la kompartio de Ĉinio. Li estis arestata k, laŭ la lastaj informoj, fine post multaj klopodoj de amikoj, ricevis permeson iri al Sovetio anstataŭ al Ĉinio, kie li plej certe estus mortigata. Amikoj pagis la koston.

Deportotoj akuzitaj esti komunistoj ofte devas resti longan tempon en malliberejo, dum organizoj kiel la Internacia Laborista Defendo per advokatoj k aliel klopodas malhelpi, ke ili estos deportataj, almenaŭ ne al terorlandoj, sed anstataŭ tio al Sovetio, kie ili povas eniri laŭ permeso de l'sovetia registaro k trovi rifuĝejon. Usono ne povas devigi Sovetion akcepti la deportotojn, ĉar mankas diplomataj rilatoj inter la du landoj. Ne forestas sugestoj, ke oni starigu tendarojn en malproksima loko usona k forpelu tien radikalulojn, kiuj pro diversaj kialoj ne estas facile deporteblaj.

Kelkaj landoj rifuzis akcepti siajn nacianojn pro diversaj pretekstoj k ŝajnas, ke Usono ne povis deporti kelkajn, ĉar pasportoj ne estis akireblaj. Norvegio rifuzis akcepti personojn forestintajn pli ol dek jarojn. Laŭ la leĝoj de tiu lando oni perdas sian civitanecon post restado de pli ol dek jaroj eksterlande. Oni argumentas, ke ĉar Usono estas kvazaŭ krimlernejo, ĉi tiu lando devus prizorgi siajn proprajn lernantojn. „Se multaj honestuloj fariĝas komunistoj pro la krima agado en ‚altaj lokoj' k ribelas kontraŭ la malmoralaj kondiĉoj, tio estas via afero k ne la nia. Vi bezonas tiajn homojn pli ol ni.“

Nuligo de civitaneco.

La usona parlamento elektis en 1930 komitaton por esplori la komunistojn. Post ses monatoj ĝi raportis k rekomendis i. a., ke oni malpermesu al komunistoj fariĝi civitanoj k oni nuligu la civitanecon de tiuj, kiuj estas civitanoj! Fakte oni jam kelkfoje faris tion.

La gazetoj de Herst propagandas por tio, ke neniu fremdulo povu fariĝi civitano antaŭ ol li loĝis almenaŭ dek jarojn en la lando anstataŭ kvin jaroj kiel nuntempe. Estas menciinde, ke la raportistoj de l' Herst-gazetaro ricevis instrukciojn ĉiam akcenti, se eble, kiam krimo estis farata, ke la krimulo estas fremdnaskito aŭ, ke liaj gepatroj estis tiaj. Sed Usono restas la „hejmo de liberuloj k bravuloj." Ne povas ekzisti dubo pri tio, ĉar la statuo de Libero ankoraŭ staras en la Nov-Jorka haveno.

La deportada leĝo mencias pri „anarkistoj, prostituistoj k nedeziratoj" kiel preteksto por deportado. „Malmorala malnoblo" estas alia elasta termino uzata. Sed la plej elasta el ĉiuj esprimoj en tiu leĝo k vera korvarmigilo al advokatoj, estas tiu pri „ema fariĝi publika prizorgato." Laŭ tio preskaŭ ĉiuj loĝantoj en Usono estus deporteblaj k „Deportado"-Doak ne fariĝos senlaborulo pro manko de laboro.

Usono estas nenia paradizo nuntempe. La deportada manio furiozas en tempo, kiam la usonaj impostaj leĝoj estas la plej premaj en ĝia historio. Ŝajne la deportadaj k impostaj leĝoj parencas. Ĉiuokaze tiaj leĝoj nur mizerigas la laboristaron k pliriĉigas kelkajn milionulojn.

Ĉu forigo de ĉiaj limoj, landaj, ŝtataj, urbaj, iel povus plimizerigi la proletojn ol la nunaj „ĉinaj muroj" jam faris?

Luj, Horzono 16.

Ŝtutgart, la kongresurbo, en la laborista movado.

Vilhelmo Ŝvab.

Ĉi-artikolo estas verkita speciale por „S-ulo". La verkinto estas maljuna K-do, kiu depost jardekoj partoprenas la proletan movadon. Dum jaroj li estis malliberigita. Ofte dum sia vivo la reganta klaso venĝis sin k tamen ĝi ne sukcesis rompi lian karakteron k klaskonscion. Ankoraŭ nun nia ŝatata K-do Ŝvab dediĉas sian riĉan sperton k forton al la subpremata tavolo.

En la historio de la laborista movado Ŝtutgart ludis gravan rolon. Unue ŝajnis, kvazaŭ la najbara urbo Eslingen volus ĝin superi. La industria evoluo okazis en la mallarĝa valo de l' „Nesenbaĥ", en kiu situis kunpremite Ŝtutgart, pli malrapide ol tie en la „Nekar"-valo, kie jam en la jaro 1869 estis konstruita la mila lokomotivo. La etburĝa karaktero de l'ŝvaba reĝa restadejo (Ŝtutgart) efikis ankaŭ al la laborista movado. La alo Ŝulce-Deliĉ (Schultze-Delitzsch) estis reprezentita en la lab. klerigasocio k en la kooperativoj. Ili aranĝis kongreson en la j. 1865. El la du antaŭuloj de l'germana socialdemokrata partio la alo de Ajzenaĥ kongresis en 1870 en Ŝtutgart. Dum la daŭro de l'kontraŭsocialista leĝo la urbo iĝis valora por la moderna lab. movado. Ĝuste pro tio, ke Ŝtutgart ankoraŭ ne estis tiel forte industriiĝinta, la kontraŭsocialista leĝo (sub la reĝimo de Bismark) ne estis tiel akre plenumata; Ŝtutgart fariĝis la sidejo de kelkaj centristaj organizoj k de l'laborist-tendenca eldonejo Dic (Dietz). En Hamburg, Berlin, Lajpcig la socialdemokrataj gvidantoj estis forpelataj. Parte ili venis al Ŝtutgart k influis tie la politikan vivon.

Dum oktobro de 1898 estis en Ŝtutgart socialdemokrata partitago k post ĝi multaj sindikataj ligaj kunvenoj k kongresoj de l'laboristaj organizoj. La plej grava el tiuj estis la Internacia Laborista Kongreso en la jaro 1907. Dum tiu kongreso oni pridiskutis la militan problemon k post vigla debato estis akceptita rezolucio, kiu devigis la laboristojn, speciale la reprezentantojn en la parlamentoj, „elmontrante la klaskarakteron de la burĝa socio k la kaŭzojn, kontraŭbatali la armadojn surmarajn k surlandajn k rifuzi la rimedojn por ili, plie tiel agadi, ke la junularo de l' laborista klaso estu edukata en la spirito de l'popolinterfratiĝo k de l' socialismo k fariĝu klaskonscia." — —

La du lastaj alineoj de l'rezolucio, kiuj estis proponitaj de Roza Luksemburg, Lenin k Martof, tekstis jene:

„Se minacas la eksplodo de milito, tiam la laborantaj klasoj k ties parlamentaj reprezentantoj en la partoprenantaj landoj estas devigataj, subtenate de la unuiga agado de la Internacia Socialista Oficejo, ĉion fari por malhelpi per la apliko de la al ili plej efike aperantaj rimedoj la eksplodon de l'milito, kiuj ŝanĝiĝas nature laŭ la pliakriĝo de l' klasbatalo k de la ĝenerala politika situacio.

En la kazo, se la milito tamen eksplodus, ili estas devigataj, klopodi por ties baldaŭa finiĝo k celadi per ĉiuj rimedoj al tio, eluzi la per la milito estigitan ekonomian k politikan krizon por la ribeligo de l'popolo k per tio plirapidigi la forigon de l'kapitalista klasregado."

Sep jarojn pli poste ĉi tiu rezolucio estis kruele ilustrata per la t.n. mondmilito, ĉe kies ekplodo la II-a Internacio terure malfunkciis.

Estu permesate al mi ĉe tiu okazo mencii malgrandan epizodon, dum kiu esperanto pruvis sian taŭgecon. Kun kelkaj aliaj K-doj dum la Internacia Laborista Kongreso mi havis la taskon disdoni alvenintajn poŝtaĵojn al la delegitoj, kvankam neniu inter ni scipovis flue paroli fremdan lingvon. Spite tio, ĉio pasis relative bone. Sed unufoje ni trafis en grandan embarason. Angla K-dino deziris de ni informon. Bedaŭrinde ni ne komprenis ŝin. Tradukisto momente ne estis trovebla. Fine K-do Peus sukcesis komprenigi sin per esperanto k montriĝis, ke la K-dino atendis pakaĵon kun propagandmaterialo por esperanto.

Okaze de tiu kongreso estis aranĝata amase vizitita manifestacio, ĉe kiu krom aliaj ankaŭ Ĵores (Jaurès) pa-

Laŭlanda partopreno en la ŝtopado de la breĉo.

Kiam ni faris la unuan laŭlandan statistikon pri la ricevitaj sumoj (en la n-o 383), ni povis konstati, ke la ŝtopadon de la breĉo helpis Gek-doj el 16 diversaj landoj. Intertempe la nombro da landoj plialtiĝis ĝis 19: en la listoj 12-15 efektive kontribuis ankaŭ K-doj el **Latvio, Polio** *k* **Danio.** *Facile tenas la unuan lokon* **Nederlando** *kontraŭ ĉiuj konkurantoj;* **Francio** *restas dualoke, sed perdas iom da distanco kontraŭ la tria konkuranto:* **Germanio.** *La aliaj landoj tenas sian lokon; tamen kelkaj (Britio, Belgio, Kanado, Hispanio) ĉi-foje ne partoprenis, k kelkaj kiel Finlando, Japanio, Portugalio, restas ankoraŭ ekster la vico da konkurantoj (nenia sumo venis el tiuj landoj).*

Daŭrigu, Gek-doj, klopodi por la definitiva forigo de la deficito en la buĝeto: daŭrigu kolektadi monon, unuope k per listoj, por ke SAT povu retrovi sian financan ekvilibron k rekomenci pozitivan laboron.

Sumoj kolektitaj per la listoj 12—15 (laŭlande)[1]:

1. Nederlando:	mk. g.	89.33
2. Germanio:	mk. g.	21.60
3. Francio:	mk. g.	16.45
4. Svedio:	mk. g.	12.93
5. Latvio:	mk. g.	7.50
6. Usono:	mk. g.	6.90
7. Polio:	mk. g.	5.20
8. Ĉeĥoslovakio:	mk. g.	3.70
9. Svisio:	mk. g.	3.—
10. Aŭstrio:	mk. g.	2.98
11. Danio:	mk. g.	0.86
Sume:	mk. g.	170.45
Sumo de l'unuaj listoj (vd. n-on 383)		924.77
Tuta ĝisnuna rezulto:	mk. g.	1095.22

Por ŝtopi la breĉon

15. listo.

	A. Piotrowski (Krakow)	mk.g.	2.20
	Lab. Ligo Esperantista (Praha)	kr.ĉ.	20.—
2506	F. Kröger (Nordhausen)	mk.g.	0.50
16927	L. Steinbach (Wien)	mk.g.	0.70
13268	Ben Odinov (Nov-Jorko)	dol.	1.—
8277	A. H. v. Loon (Roterdam)	mk.g.	3.20
17556	H. Gunsilius (Geislingen-Steige)	mk.g.	0.50
17634	Tage Lau (Kopenhago)	kr.d.	1.—
17505	B. Kalksma (Amsterdam)	guld.	1.50
17504	A. Klomp (Amsterdam)	guld.	1.50
17506	C. Prins (Amsterdam)	guld.	1.50
17508	F. de Rover (Amsterdam)	guld.	1.50
17507	W. H. Stappers (Amsterd.)	guld.	1.50
17478	S. J. Ysselstein (Schiedam)	guld.	1.30
16928	Pichler (Vieno)	mk.g.	—.50
1275	M. Rummel (Brooklyn)	mk.g.	2.70
13705	F. Bergquist (Lärje)	mk.g.	—.68
55		fr.fr.	25.—

[1] Transkalkulitaj en markojn germ. laŭ kurzvaloroj de l'1. VI. 32.

roladis. Samtempe okazis internacia junularkonferenco.

Dum la mondmilito ankaŭ en Ŝtutgart estis nur malgranda areto, kiu alte tenis la standardon de l'internacia socialismo. Sub la gvidado de Fr. Vestmejer la kerno de l'Ŝtutgarta organizo elpaŝis kontraŭ la militpolitiko de la socialdemokrata partio germana k estis tial eksigata. Grandajn oferojn postulis tiu ĉi batalo. Multajn jarojn Ŝtutgartaj K-doj devis pasigi en malliberejoj k karceroj, ĝis fine en novembro 1918 ankaŭ ĉi tie la indigno inter la popolo liberiĝis.

Jam la 4. novembro la laboristoj forlasis la laborejojn k manifestaciis por la ĉesigo de l'milito. Kelkaj gvidantoj estis arestataj. Tio donis al la movado novan ekpuŝon. La amasa manifestacio je la 9. 11. 18 ne plu trovis kontraŭstaron. La reĝo abdikis k formiĝis la nova registaro, sed ne sen internaj bataloj inter la proletaro.

La laboristajn k soldatajn sovetojn oni senpovigis, la „Spartakistoj" estis subpremataj k la burĝa ŝtataparato estis nove ekkonstruata. Lastan fortostreĉon la Ŝtutgarta laboristaro faris dum la impostostriko en 1920. La proletoj sin defendis kontraŭ la impostdepreno el la salajro. Laŭ ordono de l'ŝtata prezidanto Hiber la Ŝtutgartaj grandaj laborejoj Dajmler, Boŝ k Maŝinfabriko Eslingen fermiĝis la 25-an de aŭgusto. La fabrikoj estis baratąj per dratbariloj k maŝinpafiloj. Sur tabuloj estis anoncite: „Kiu plueniras, estas mortpafota!". Kiel kontraŭagon la proletoj deklaris la ĝeneralan strikon, kiu rapide disvastiĝis kelkparte, sed kiu bedaŭrinde ne sukcesis transpaŝi la limojn de Virtembergo. Je la 6. septembro la movado finiĝis, tamen la laboristoj de l'firmo Dajmler en Untertirkhejm rekomencis labori nur la 24. septembro. Ŝtutgart fariĝis poste tiel trankvila urbo, ke la regnaj registaro k parlamentanoj rifuĝis al Ŝtutgart, kiam en Berlin okazis la Kapribelprovo (Kap [Kapp] = blankgvardiano). Kaj kiam la postmilita krizo kun la bilioninflacio atingis sian plej malaltan nivelon, la senpacienco okazigis nur unuopajn farojn.

Ŝtutgart etendiĝis en la mallarĝa rondvalo; la industria disvolviĝo ne preterpasis senpostsigne, tamen ĝi ne iĝis industria urbo. La laboristaj organizoj ankoraŭ montras iagradan firmon. Sed la nun reganta mondkrizo kaŭzas ankaŭ por la laboristaj organizoj malbonan tempon, kiun ili nur povos venke trapasi, se ilin vivigos la batalspirito, kiu iam estis viva ankaŭ en la Ŝtutgarta laborista movado.

Trad. Ulo.

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en „S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

Politika k ekonomia vivo en Latvio.

Neniam dum la tuta ekzisto de l' nuna Latvio sentiĝis mizero k blanka teroro tiom forte, kiom en tiu ĉi jaro. Verŝajne baldaŭ la reakcio per armita ribelo ekkaptos la ŝtatan povon malkaŝe. La tuta ekonomia vivo malprogresas. La dogan-impostoj sur la vivbezonaĵoj estas pli altigitaj. Dume la impost-enspezoj (per dogano) evoluis tiel: en la jaro 1929 estis 65 milionoj da latoj (1 lato = ĉ 0,20 dol.), en 1930 — 56 mil. k en 1931 — 34 mil. Jena estis la situacio pri

	eksporto en latoj	*importo*
1930	56 milionoj	72 milionoj
1931	33 milionoj	47 milionoj
1932	22 milionoj	18 milionoj

La malaltiĝo de l'kamplaboristaj salajroj montriĝas per jena tabelo:

Kamplaborista salajro tutjara. Interkrampe estas citita la salajro de l'virinoj.

Provincoj	*jaro 1932*	*1931*	*1921–29*
Vidzeme	336 (245)	508 (356)	496 (320)
Kurzeme	306 (209)	473 (315)	444 (225)
Zemgale	335 (248)	478 (335)	497 (315)
Latgale	250 (179)	359 (255)	334 (226)

Ankaŭ la maristaj salajroj estas malaltigitaj je 10% k triono el la tuta ŝipanaro estas senlabora. Oni eĉ komencis aresti la ne-impostpagantojn (kiuj ne *povas* pagi). Multaj komunumoj ŝuldas al instruistoj. Ĉi tiuj vegetas ne ricevante regule la salajron. La burĝaj gazetoj hurlas pri memmortigoj pro „amafero", se iuj sinmortigas pro malbonaj vivcirkonstancoj. Eĉ ili ne hontas tiel diri, se sin mortigis 70-jarulino.

La instruistaro prezentis per 4500 subskriboj al la parlamento sian postularon, ke la salajrojn pagu senpere la klerigministerio (ĉar ĝis nun pagis ĝin la ministro por intern-aferoj pere de l'komunumoj). Kiam la instruistoj venis al la parlamentejo, la parlamentanoj akceptis al ili favoran rezolucion, kiu estis tuj nuligata, kiam ili forveturis.

Al la malsanej-kasa unuiĝo (kiu kongresis la 1-an de junio en Rigo) apartenas 34 kasoj kun 128 700 salajruloj k 82 300 familianoj. Ekster la unuiĝo staras 6 kasoj kun 19 900 salajruloj k 11 300 familianoj. Ankaŭ al tiuj kasoj la ŝtato ŝuldas sian subtenon. Dum la kongreso socialdemokratoj k komunistoj reciproke kulpigis sin pri perfido. En 1930 estis asekuritaj en la malsanej-kasoj 179 636 personoj, dum 1932 en januaro 141 861 pers., en febr. 138 470 k en marto 137 154 personoj.

La 29-an de majo okazis kongreso de militintoj, kiun partoprenis 12 organizoj (sume 30 mil membroj). La maldekstra flanko starigis la tielnomatan „kontraŭmilitan demandon", sed la kongreso malakceptis ĝin. Kiam la dekstruloj akceptis statutŝanĝan rezolucion, la maldekstruloj brue foriris (sume 3 organizoj kun pli ol 11 mil membroj).

Malgraŭ malgrandiĝo de l'fervojaj enspezoj k ĝenerala mizero oni komencis laboron por konstrui novajn fervojojn k ŝoseojn gravajn por militceloj. Verŝajne Latviaj komunistoj pravas, ke la ŝtato kun alilandaj imperiistoj preparas invadon en Sovetion. Ĉar la ekzisto de Latvio dependas de la favoro de Anglio k Francio. Antaŭ la laboristaro staras pezaj tagoj k neniu scias pri la morgaŭo. Vere, la laboristaro ne estas batalpreta; en la sindikatoj estas organizitaj 23 mil homoj (estas soc.-demokrataj organizoj); la soc. dem. partio havas 9000 membrojn; sed sur la dorso de l'organizitoj rajdas gvidantoj, kies metio nura estas „gvidi" favore al la ŝtato k tiel panakiri por si.

La kompartio estas neleĝa („subplanka") kun 1000 membroj (samnombra estas ankaŭ la kom. junularo). La polico ofte esploras pri pasportoj surstrate. Pro strikagitado okazas arestoj. Per leĝo ŝtat- k komunum-oficistoj ne rajtas striki. Pro kontraŭmilita enhavo la 5-a n-o de „Proleta Esperantisto" estas konfiskita. Pro sama kialo estas fermita filio de kamplaborista sindikato.

Ŝtato k burĝa „demokratio" neniam helpos k savos la laboristaron. Bonstaton k liberon ni atingos nur en anarkio.

A. Neselbergs (17 457).

EL ĈINIO.

Estas sciinde nun, kiel oni traktis la soldatojn de la 19-a Armeo, kiuj post pli ol unumonata heroa batalo kontraŭ la moderne armita, nombre pli granda imperiisma armeo retiriĝis de Ŝanĥajo sub la ordono de siaj generaloj. Laŭ „China Forum" (aliaj ĵurnaloj nenion raportis tiurilate) la soldatoj estis nepagitaj por 5 monatoj. Dum la komenco de la milito ĉiuj ricevis nur po 2 dol. (ĉ. usona dolaro 0.45) k poste la vunditaj soldatoj ricevis 3—15 dol.; per tiu sumo la vunditoj, kiuj povos nek vendi sian laborforton al la kapitalistoj, nek sian vivon al la generaloj, devus vivteni sian estontan vivon k tiujn de siaj familianoj. Dume estas konate, ke depost la milito 3 milionoj da dol. estas donacitaj al la armeo de la popolo pere de bankoj k la superaj oficiroj! La 25-an de marto 11 vunditaj soldatoj estis arestitaj en la Ruĝkruca Hospitalo de la franca polico k transsenditaj al la ĉina registaro (internacia kunlaboro!). La kaŭzo estas, ke ili organizis sin por defendi siajn elementajn rajtojn, interalie precipe pri la al ili ŝuldita 5-monata salajro. Pro la sama kaŭzo 3 aliaj ankaŭ estis arestitaj kelkajn tagojn pli poste. Dum la sorto de 3 el la 14 „krimuloj" restis nekonata, 10 estis malliberigataj en policejo k 1 mortigata,

okazis denove arestoj al aliaj 18 vunditoj!

Kiel la soldatoj, la instruistoj k dungitoj de edukaj institucioj en la Hupej-provinco estas ankaŭ nepagitaj por 4–5 monatoj. Striko ne alportis rezulton.

Sed por akcepto de la Liga Komisiono (temas pri kontrolkom. de Ligo de Nacioj – *Red.*) vizitinta antaŭnelonge nian urbon, la registaro elspezis ĉ. 10 mil dolarojn. Pri tiu sumo la Kuomintana ĵurnalo raportis kun la vorto „nur“. Ja vere 10 mil estas mizera sumo kompare al 800 mil dol., kiun sumon la Nankina registaro ĵus donis al la generalo Ĉen-Ĉi-Tang por ataki la ruĝan distrikton en Meza Ĉinio. Al tiu ĉi generalo estas garantiata krome sumo de 500 mil dolaroj monate por lia fifunkcio!

Laŭ „La Espero“, Hankovo (marto/aprilo 1932.)

Letero el Britio.

La brita registaro k Manĉurio.

Jen la kialo pro la neenmiksiĝo de la brita registaro en la kvazaŭmilito inter Japanio k Ĉinio: Laŭ oficiala sciigo en la brita parlamento municiaj firmoj en tiu lando dum febr., marto k aprilo vendis al Japanio 240 maŝinpafilojn k 6 milionojn da kartoĉoj. Dum tiuj samaj tri monatoj al Ĉinio oni vendis 25 maŝinpafilojn, 505 mil kartoĉojn por tiuj, k 500 mil ordinarajn kartoĉojn. Plie, oni provizis multe da kordito k T.N.T. (trinitrotolueno) (specoj de pulvo). „La milito helpu al nia profito“, diras la britaj armilfabrikantoj.

La klasbatalo.

Dum 1931 k en la daŭro de la tri unuaj monatoj de 1932, laŭ tabelo kompilita de la Laborista Esplorfako, 58 Gek-doj estis malliberigataj pro politikaj k ekonomiaj kaŭzoj. La plejmulto konsistas el komunistaj K-doj, k la kulpigoj temas pri ribeloj en la ŝtata marservo, incitoj kontraŭ la ŝtato k atakoj kontraŭ policistoj. La estraro k presisto de l'kom. ĵurnalo „Ĉiutaga Laboristo“ ricevis punlaboron en malliberejo ĝis 3 jaroj. Kelkaj K-doj estis kandidatoj por la parlamento en 1931, k preskaŭ ĉiuokaze la akuzistoj faris sian eblon por trudi sian politikan inklinon dum la juĝado.

La karbministoj.

Laŭ sciigoj en la parlamento, dum la jaro 1913, kiam la karbministoj laboris ok horojn ĉiutage, ili elfosis po 1034 kilogramoj. Lastan jaron, kvankam ili laboris nur 7½ horojn tage, ili elfosis po 1093 kg da karbo. Dum la lastaj dek jaroj la meza enspezo de ĉiu karbministo malaltiĝis de 223 ft. sterl. jare ĝis 114 ft. k lastjare okazis 140 mil akcidentoj. Dum 1931 la karbindustrio produktis sume 219 milionojn da tunoj, sed samtempe la industrio dungis nur 868 mil karbministojn kompare al 1,105 mil en 1913. Perdis la vivon 879 viroj, k 3304 ricevis gravajn vundojn. 39 junuloj, kiuj estis malpli ol 16-jaraj, estis mortvunditaj k pli ol 7000 knaboj samaĝaj devis foresti pro sufiĉe gravaj difektoj ricevitaj.

Brita Lab. Sport-Asocio.

Laŭ ĝia jarraporto filiiĝis al la citita asocio dum la lasta jaro 18 diversaj sport-organizoj, kiuj en siaj kadroj havas multnombrajn sekciojn. Ĉe la Lab. Olimpiado en Vieno la brita taĉmento estis tre malgranda, sed gajnis la kvaran lokon el la 22 konkursintaj naciaj reprezentantaroj. Ĉe la naciaj gimnastikaj konkursoj okazintaj en la Kristala Palaco troviĝis 350 partoprenantoj. Bedaŭrinde okazis disputo inter la brita k holanda sport-asocioj rilate al la vizito de la unua al Holando, sed espereble la afero decidiĝos per reciproka aranĝo.

SATEB.

Paroloj ne sufiĉas!

J. Burger — *Mel. germ.: „In einem kühlen Grunde“.*

Bovido blekas ĝeme
en la buĉeja kort';
helpvokas ĝi krurtreme
pro tim' de frua mort'.

Laŭtdiras du virinoj
kun larmoj de kompat':
„Kruelaj hominklinoj!“
„Terura kulturstat' !“

Sed jam post unu horo
aĉetas por la fest'
la du en bonhumoro
viandon de la best'.

Foriĝas ja suferoj
ne per kompat-parol',
ĝin faras karakteroj
kun tre agema vol'.

Stranga sinteno de aŭstria sindikato.

Kiel en aliaj landoj, ankaŭ en Aŭstrio ekzistas diversaj sindikatoj, diversaj ne nur laŭprofesie, sed krome laŭ politika partieco. Ekzistas do kristanaj, germannaciaj, socialdemokrataj, eĉ faŝismaj sindikatoj, kiuj konkuras unu kontraŭ la alia, argumentante per politikaj devizoj k per cito de la avantaĝoj, kiujn la membroj ĉe la koncerna sindikato ĝuas. Tiuj avantaĝoj konsistas el salajrokontraktoj, sindikata monsubteno (krom la ordinara) dum senlaboreco k dum maljunaĝo, advokata helpo ĉe procesoj kontraŭ entreprenistoj, perado de malmultekostaj biletoj por teatroj, banejoj ktp.

La senlaborula subteno estas la plej grava avantaĝo, sed ĝi tre diferencas ĉe la diversaj sindikatoj. Ekzemple la metallaborista sindikato (temas nur pri la socialdemokrataj sindikatoj, ĉar la cirkonstancojn ĉe la aliaj mi ne konas) donas al siaj senlaboraj membroj po 6 ŝil. dum 12 semajnoj (do sume 72 ŝil.), egale kiom longe la membreco daŭris. Aliflanke la industrioficista sindikato gradigas la subtenon laŭ daŭro de la membreco k ĝis antaŭ nelonge la senlaboraj membroj rericevis 80% el sia pagita kotizo kiel subtenon. (La restaj 20% perdiĝas kiel administraj kostoj.) Kompare senlabora industrioficisto post 25-jara membreco ricevis kiel subtenon sume ?[1] ŝil., sed senlabora metallaboristo nur 72 ŝil., kvankam la membrokotizo de la metallaborista sindikato ĝenerale estas *pli alta* ol tiu de la industrioficista. Kaŭzo de tio, laŭ mi, estas la fakto, ke la metallaboristoj estas pli „solidaraj“ k nekritikemaj, dum industrioficistoj ne emas aliĝi al la sindikato (pro burĝeca pensmaniero) k tial oni devas ilin logi per tiaj privilegioj.

Antaŭ kelkaj monatoj la industrioficista sindikato iom malplibonigis siajn kondiĉojn. Nun ankaŭ senlaboraj membroj devas pagi la plenan (!) kotizon. Pro la terura senlaboreco la elspezoj

[1] Mankis en la manuskripto indiko de la sumo. – *Red.*

Ĉ I U J N



de vi bezonatajn esperantaĵojn, el kiu ajn eldonejo (librojn, broŝurojn, lernilojn ktp) vi povas mendi ĉe la

ADMINISTRACIO DE SAT,
Kolmstrasse 1, Leipzig O. 27.

Notu bone tion en la memoron k neniam forgesu, ke aĉetante ekskluzive ĉe SAT vi tre efike helpas al ĝi por „ŝtopi la breĉon“!

de la sindikato kreskis, la enspezoj malkreskis. Tamen ĵus mi eksciis, ke la sindikato aĉetis propran domon (en burĝeca kvartalo de Vieno) por siaj oficejoj!

Estus interese, se la SAT-anoj interŝanĝus siajn spertojn rilate al la sindikatoj (subteno, kotizo por senlaboruloj). Ni ne volas pagi kotizojn, por ke kelkaj personoj havu bone pagatajn postenojn aŭ por ke la sindikatoj aĉetu domojn je kostoj de siaj plej malriĉaj membroj. *Klarvidulo.*

Mi volus fariĝi prostituino!

La sekvanta letero venis al la redakcio de „Laborista Gazeto" (Vieno) k estis publikigita en ĝi. Ĉar ĝi estas dokumento de nia tempo, mi opinias, ke ĝia enhavo koncernas ne nur la legantojn de la aŭstria gazeto, sed la tutmondan proletaron. Tial mi tradukis ĝin esp-en. Jen ĝia enhavo:

Mi permesas al mi peti el vi informon. Estas eble, ke ĝis nun ankoraŭ neniam oni demandis vin pri tia afero. Mian decidon kaŭzis la terurege malbonaj tempoj. Jam antaŭe mi petas vin doni al mi precizan k definitivan respondon. Estus tute sencele konsoli min per espero je pli bonaj tempoj aŭ je momenta helpo per mallongdaŭra subvencio aŭ eĉ per havigo de posteno, kiun oni denove perdos jam morgaŭ. Ĉar ĉio tio estas ja nur mallongdaŭra. Mia decido staras firme! Do, mi volus demandi — kiel mi venas sub la polican kontrolon? Mi volus fariĝi publikulino! Sed mi ne volas agi sekrete, sed sub kontrolo.

Mi estas 25-jara, katolika, needziniĝinta, naskita en Supra Aŭstrio, nuntempe senlabora. Ĝis antaŭ 2 monatoj mi estis domservistino. Depost mia 4-a vivjaro mi vivis ĉiam inter fremdaj homoj. Mi povas diri: „Mi naskiĝis servante". Jam kiam mi estis ankoraŭ infano, mi devis paŝti la brutarojn de la kamparanoj, por ke ili zorgu pri mi. Depost kvar jaroj mi havis multajn postenojn kiel domservistino. Eĉ ne unu el la postenoj estis bona. Se iu posteno estis iomete kontentiga, la sinjoro de ĉi tiu opiniis nepre, ke la fraŭlino devas taŭgi ankaŭ por lia lito. En miaj du lastaj postenoj tio ne okazis. Sed anstataŭe mi devis laboregi dum tutaj noktoj k ricevis nur malmulte da manĝaĵo. La salajro, kiun oni pagis al mi, konsistis el tre etaj partopagoj. Ne maloftaj estis la tagoj, dum kiuj mi laboris de la 6-a matene ĝis la 24-a nokte. Sed nun — tro sufiĉe.

Mi petas rapidan k precizan respondon. Bonvolu skribi al mi: Ĉu miaj gepatroj devas sciiĝi tion, kia mi fariĝis? Ĉu la prostituo kaŭzos malutilojn al mi? Post kelka tempo, kiam mi estos ŝparinta monon, mi volus vojaĝi eksterlanden. Ĉu mi kiel prostituino ricevos pasporton? Ĉu prostituo kaŭzas malutilon por ebla pli malfrua edziniĝo? Mi dankas vin pro via helpo. *Mici F.*

Voko el la profundo! Ĉu ĝi estos aŭdata?? Jes, certe, — sed vane! Multegaj estas la viktimoj, kiuj kuŝas sur la vojo de la mortanta kapitalismo. Ĉu ankaŭ vi, K-do, K-dino, volas fariĝi viktimo de la pereanta sistemo? Certe ne! Tial ni ne volas atendi ĝian lastan elspiron, ĉar ĝis tie — laŭ la parolado de la socialdem. gvidanto Otto Baŭer — povas pasi ankoraŭ kelkaj jarcentoj. Ne, ni ne volas, ke la kapitalismo mortadu trankvile, ni volas ĝin sufoki! — plej prefere ankoraŭ hodiaŭ!

K. Gelmayer (17 177).

MI VOLAS SCII...

1. Ĉu ekzistas homoj, popoloj, gentoj, kiuj havas apartajn malfacilojn, lernante, parolante, prononcante esperanton?

Ofte mi aŭdas esperanton parolata laŭ maniero neplaĉa, nekorekta. Tial mi demandas, ĉu naturaj kondiĉoj pravigas koncernajn parolantojn.

2. Kiu prononcas esperanton plej korekte? Ĉu ĉiuj imagas prononci ĝin korekte? Ĉu iuj konscias, ke ilia prononcado ne estas korekta? Ĉu ie ne ekzistas provoj korekti, unuecigi prononcadon?

3. Kiu povas informi min, kiom da lingvoj ekzistas en Ĉinio? Kiomgrada estas la diferenco inter ĉina k japana lingvoj? Ĉu ekzistas pluraj japanaj lingvoj k kiuj? Kiom da lingvoj ekzistas en Hindio?

Mi provis per korespondado ekscii pri ĉi tio, sed vane. Skizante la mondbildon laŭlingvan en miaj propagandparoladoj, mi ofte sentas breĉon pro nescio pri tiuj demandoj. *5320.*

POR NIA MEDITO.

NEŬTRALO.

La timo, kiu paralizas, la deziro neniun malkontentigi, decidigas multajn personojn ne manifesti praktike siajn sekretajn preferojn. Temas do tiaokaze pri ekstera neŭtralo, pri neŭtralo en la kampo de l'agado, neniel pri intima neŭtralo, kiu restas vera en la mensa kampo. Ĉe la mizeruloj, kiujn senkompataj mastroj kontrolas k turmentetas, ĉe tiuj, kiuj silentas por ne perdi la ĉiutagan panon, per kiu ili k iliaj infanoj vivas, ni komprenas tian sintenon. Tre malmultaj havas la necesan energion por la martiriĝo; ni ne postulu de ĉiuj homoj, ke ili estu herooj. Tia neŭtralo ŝajnas al ni tamen kondamninda ĉe la karieristo, kiu uzas ĝin kiel ŝtupon aŭ ĉe tiu, kiu alprenas ĝin pro manko de volo.

Male, la neŭtralo fariĝas necesa, kiam oni scias neniom pri iu afero, iu problemo. Se la popolo ofte estas trompata de lertaj intrigantoj, tio okazas, ĉar ĝi forgesas pripensi. Multaj ne scias dubi; prefere ol resti atendantaj, ili alprenas, sen antaŭa ekzameno, la sintenon aŭ la opinion de tiuj, kiuj ilin ĉirkaŭas. Tamen, nenia scienca progreso estus ebla, se la seriozaj esplorantoj ne pridubus la kredojn, eĉ universale konsentatajn, aŭ se ili ne postulus pri ĉiu aserto, ke ĝi baziĝu sur nerefuteblaj pruvoj.

La neŭtralo estas nepre necesa en la teoria kampo, rilate al la hipotezoj, kiujn nenio malkonfirmas nek pravigas; k, en la praktika kampo, rilate al la aferoj aŭ problemoj, kies fundamentojn ni tute malkonas. La granda merito de Kartezo (Descartes) estis insisti pri la gravo de l'dubado kiel metodo, k pri la neceso atingi ĝis la evidento, antaŭ ol decidi. Mi decidis, li skribis, „neniam akcepti iun aferon kiel veran, pri kiu mi ne scius, ke ĝi estas evidente tia; tio signifas eviti zorge la trorapidemon k la deantaŭan juĝon k kompreni nenion plian en miaj juĝoj ol tion, kio prezentiĝus tiel klare k tiel precize al mia spirito, ke mi havus nenian okazon ĝin pridubi."

Tiu ĉi regulo elmontriĝis ekstreme fruktodona, eĉ multe pli ol ĝin kredis Kartezo k liaj samtempuloj.

L. Barbedet (Barbedette).
Profesoro pri filozofio.

Nur por niaj membroj! **Nur por niaj membroj!**
Kontraŭ antaŭa pago!

En la Administrejo troviĝas malgranda kvanto da jenaj libroj, kiujn ni ŝatas vendi al niaj membroj kun eksterordinara prezredukto. Ĉar la provizo ne estas granda, plej rapida mendo estas rekomendinda. — La afranko estas entenita.

Dancu Marionetoj, simple bind., . . .	anstataŭ	3.40 mk.	nur	1.50 mk.,
Viktimoj, broŝ.	„	4.50 „	„	2.00 „
Tragedio de la homo, broŝ.	„	3.00 „	„	1.50 „
Pilgrimo, broŝ.	„	1.60 „	„	1.00 „
Kompleta Gramatiko de Esperanto, broŝ.	„	4.50 „	„	2.50 „

Administracio de SAT, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27.

Verku koncize! Ne skribu pri bagateloj aŭ lokaj negravaĵoj!

La klasbatalo tra la mondo

El Kanado.

En la kanadaj senlaborulaj tendaroj oni reduktis la jam tre malaltajn salajrojn. Komence oni venigis tien senlaborulojn por fari necesan laboron ŝosean kontraŭ potaga pago de 2 dol. (1 dol. = 100 cendoj). El tiu sumo oni ĉiutage deprenis 75 cendojn por nutro.

La elspezoj estis komence dividitaj inter la provinca k federa instancoj. Estiĝis malkonsento inter ĉi-lastaj. Tiam pro diversaj pretekstoj oni postulis, ke la tendaranoj ĉiumonate laboru 120 horojn kontraŭ pohora pago de 25 cendoj. Post dekalkulo de manĝkostoj restis al tendarano nur monata salajro de 7.50 dolaroj.

Kelkloke la tendaranoj rifuzis akcepti la salajran redukton k dum du monatoj ne laboris. Fine la instancoj decidis forpeli la aktivulojn el inter la protestantoj en unu el la tendaroj. Ĉirkaŭe 800 tiam decidis sekvi la forpelitojn al Vankuvero, la plej granda urbo en Brita Kolumbio, Kanado.

Senlaborulo.

Salajro de kamplaboristoj en Polio.

En „Laboristo“ K-do Kvapinski, prezidanto de l'kamplaborista profunuiĝo, donas sekvantan prisalajran tabelon, kiun akceptis speciala ŝtata komisiono por kamplaboristoj. Jare kampulo ricevas

1. kategorio	–	160 zlotojn	(17–18 dol.)
		k 15 centfuntojn da tritiko	
2. kategorio	–	140 zlotojn	(15 dol.)
		k 15 centfuntojn da tritiko	
3. kategorio	–	130 zlotojn	(14 dol.)
		k 15 centfuntojn da tritiko	

Krome ĉiu kamplaboristo ricevas 10 hektarojn da grundo por terkulturado k 15 centft. da terpomoj. Loĝejo ankaŭ estas donata al ili. Do la plej bone pagataj kamplaboristoj ricevas jare, se oni transkalkulas la kompenson de l'ricevataj objektoj, 600 zl. (67 dol.)! La aliaj kategorioj eĉ ne perlaboras tiom!

Social. Gazetinformejo Esp-ista, Varsovio.

La unuecfronto de malsupre.

La 7. 6. konferenco el sindikataj funkciuloj de la Berlina Elektro-AK unuanime akceptis jenan rezolucion, imitindan de ĉiuj germanaj Gek-doj: „La hodiaŭ ... kunvenintaj libersindikataj Bevag-funkciuloj (Berlina Elektro-AK) komisias al la ĉeestantaj sindikataj delegitoj de (la diversaj sindikatoj), ke ili senhezite instigu la gvidasociojn verki bazon por la *kreo de komuna maldekstra elektokuniĝo Socialdem. Partio Germ. (SPG) – Komunista Partio Germ. (KPG)* aŭ kunigo de l'listoj. Miloj da funkciuloj k milionoj da laboristoj k salajruloj atendas en la nuna *momento de plej granda danĝero* por la pluekzisto de l'laborista movado, post longjaraj eraroj de ambaŭ flankoj – konsciiĝon! Kreu la ondon de entuziasmo, kiun atendas dekmiloj da funkciuloj por venki per nerezistebla impeto la komunan malamikon de l' laboristaro, la faŝismon, por ĉiam! Ĉi tiu rezolucio estu transdonata ankaŭ al la estraro de SPG k al la Centra Komitato de l'KPG.“ *16 900.*

Kontraŭleĝa agado en Ĉeĥoslovakio.

En Ĉeĥoslovakio, precipe en la slovaka parto, la demokrata registaro malpermesis en multaj urboj festadon de l'unua de majo, kvankam ĉi tiu tago estas leĝa laborista festotago en la lando! Malgraŭ la malpermeso oni tamen vidis sur la stratoj centmilojn postulantaj laboron k panon k manifestaciantaj kontraŭ minacanta imperiisma milito. – La provinc-estraro de Slovakio malpermesis ĉiun „leĝan organizadon“ de l'kom. partio, laŭ paragrafo farita en 1875 de l' hungara internministro! *Virgi.*

Teroro kontraŭ Japana Proleta Esp-ista Unuiĝo.

La 2-an de majo en Tokio 6 anoj de Japana Prol. Esp-ista Unuiĝo estis arestataj pro la polica supozo, ke ili vigle agadis por rekonstrui la Federacion de prol. kultur-organizoj japaniaj, kiu lastatempe suferis teruran subpremon. Japana Prol. Esp. Unuiĝo havas ĉefoficejon en Tokio k 5 sekciojn en la tuta lando k publikigas sian organon „Kamarado“. La 6-an la arestitaj K-doj unuiĝante postulis liberigon de senmotiva aresto. Kompreneble la polico ne akceptis la postulon k ili komencis malsatstrikon en la malliberejo. *Stelaro.*

Mondprotesto kontraŭ Usona teroro kontraŭ negroj!

Kiel antaŭ 5 jaroj la tutmonda laboristaro impetege protestis en kunvenegoj k ofte spontaneaj manifestacioj kontraŭ la ekzekuto al Sako k Vanceti, tiel hodiaŭ en la eŭropaj ĉefurboj k multaj aliaj lokoj okazas grandaj protest-kunvenoj por malhelpi novan krimegon de la usona kapitalismo: la ekzekuton al ok junaj negroj (en aĝo de 15–20 jaroj!), fiksitan por la 24-a de junio.

Kial ili estis kondamnitaj? Ĉar ili estas *negroj!* Pro nuraj rasaj konsideroj! Ilia laŭdira krimo? Ke ili perfortis du blankhaŭtajn prostituinojn, pri kio ekzistas nenia pruvo (la virinoj mem protestis kontraŭ la kulpigo al la junuloj)!

La patrino de du el tiuj malfeliĉaj knaboj travojaĝis la eŭropajn ĉefurbojn k paroladis antaŭ la indignitaj laboristaj amasoj. La amasa protesto sukcesis prokrasti la plenumon de l' juĝo. Ĉu ĝi sukcesos ĝin malebligi?

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

La nova germana registaro dekretis la restarigon de l'Hitleraj ataktaĉmentoj, malaltigis la senlaborulan subvencion je 23%, impostis plie la salajrojn, malpliigis la rentojn de militinvalidoj, malpliigis la impostojn de l'industriistoj. Ĝi projektas instali „volontulan laboron“ (t. e. laborservo simila al militservo) k koloniigon sur la kamparo.

La registaroj de la *sudaj ŝtatoj germaniaj* (Bavario, Badeno, Virtembergo) kontraŭstaras la dekretojn de l'regna registaro pro politika malinterkonsento.

Okazis teatrece aranĝita *politika proceso en Romo* kun la celo kompromiti la kontraŭfaŝistajn italajn organizojn en eksterlando. Unu akuzito estas kondamnita je morto k mortpafita, la aliaj je 30- k 10-jara malliberigo.

Atenco kontraŭ *Musolini*, laŭŝajne farita de provokisto por popularigi denove la figuron de la ĉefbandito, malsukcesis – kompreneble. „La *Duce* estas nevundebla“, skribis triumfe la faŝistaj organoj. La atencinto estas mortpafita.

Ĉe la *Lozana* (Lausanne-a) *konferenco* pri militŝuldaj pagoj la politikistoj de l'Entento konsentis plian pagprokraston al Germanio.

Pri la cetera solvo de l'riparpaga problemo regas plena malunueco de l'vidpunktoj germana, franca k brita-itala. Same en la *Ĝeneva* malarmada konferenco neniaj pozitivaj rezultoj videbliĝas.

Usono ne konsentas redukti la ŝuldojn de siaj eŭropaj kreditoroj, se ĉi tiuj ne reduktas sian milit-armilaron.

H. Barbus, R. Rolan, Sinkler, Ajnŝtejn k kelkaj aliaj eminentuloj kunvokis la laboristajn k pacismajn organizojn al *kongreso kontraŭ la imperiisma milito* k por ŝirmo al Sovetio, kiu estas okazonta dum julio en Ĝenevo.

150 000 tekslaboristoj en la regiono de *Lodz* (Polio) ekstrikis kontraŭ salajra malaltigo je 25%.

Usonaj eksmilitantoj aranĝis grandajn protestmanifestaciojn kontraŭ la registaro pro malaltigo de la kompensa sumo, kiu estas pagata al ili.

Forta movado distingiĝas en *Usono* por forigi la leĝon pri *alkoholmalpermeso;* la registaro ŝajnas decidita cedi iuforme al tiu animstato.

Por ke „LA NOVA EPOKO“ pluvivu

17013	*S. Aarse (Amsterd.)*	*guld.*	*6.–*
1		*fr. fr.*	*50.–*
	Parizaj naturamikoj	*fr. fr.*	*10.–*
55		*fr. fr.*	*25.–*

Malleĝigita studenta organizo.

En la universitato de Kaŭnas (Lit.) fondiĝis en 1931 organizo de maldekstraj marksanoj „Aurora“. Ĝi estis bone akceptata k varbis 200 membrojn, ricevis du mandatojn en la studenta konsilantaro, sukcese konkurencis al klerikalaj k faŝistaj organizoj. El socialistaj stud. unuiĝoj ĝi estis la plej forta. Reakciaj studentoj kelkfoje, eĉ per fostoj, atakis marksanojn, sed vane. Komence de majo tiu organizo laŭ rektora ordono ĉesigis sian laŭleĝan vivon. Kaŭzoj? Suspekto pri komunismo. Notinde estas, ke la rektoro estas „socialisto“ ankaŭ, eksministro de la demokrata registaro, kiun renversis la faŝismo. *K. Vincas.*

DISKUTEJO:

Kial oni ne plu parolas pri la socia revolucio?

Kiam la laborista movado ekkreskis, sed ankoraŭ estis sufiĉe malforta – antaŭ kelkdek jaroj –, oni ofte parolis pri la socia revolucio. La burĝaro eĉ treege timis ĝin k ĉiarimede subpremis la porsocialisman propagandon, por malebligi revoluciajn agojn. Tiutempe en la parlamentoj sidis aŭ neniu aŭ areto da laboristpartiaj reprezentantoj. Kiam unu el tiuj malmultaj lab. deputitoj paroladis, la tuta burĝa klaso ekaŭskultis k ĝia gazetaro dediĉis longajn artikolojn al la vortoj de l'„renversulo", kiu minacis la baldaŭan mondrevolucion.

Depost tiam ja ĉio ŝanĝiĝis. Hodiaŭ en la parlamentoj sidas ne unu, sed dekoj aŭ eĉ centoj da lab. reprezentantoj, kiuj kelklande eĉ partoprenas en la registaro. Sed iliajn paroladojn la burĝaro preskaŭ ne atentas k ĝi ankaŭ ne plu timas pro ili. Plej ofte oni decidas rekte kontraŭ la deziroj de la lab. deputitoj. Sed nenio okazas, ĉiuj silentas k neniu – krom la faŝistoj – mencias la vorton „revolucio".

Mi ŝatus ekscii klarigojn pri tiu stranga stato, sed oni evitu la konatajn k demagogiajn argumentojn.

16 462.

Pri la framasonio.

Mi tuj diru, ke per sia ritaro k per sia doktrino la framasonio iom varias laŭ la landoj k eĉ laŭ la diversaj loĝioj; sed ĝia idealo estas ĉie la sama: ĝi celas al la justo en la Socio k al la frateco inter ĉiuj homoj. La framasonoj prave fieras pri tiu sia celo k pri sia laboro, k tial mi miras, vere, ke iu inteligenta viro povas ilin juĝi tiel maljuste, kiel K-do 8004. Lia artikolo, en la n-o 387, de la komenco ĝis la fino estas nur ia kolekto da krudaj kalumnioj, ia teksaĵo el stultaj malveroj. En ĝi troviĝas la kutimaj atakoj de la katolika pastraro; mankas nur la diablo, prezidante mem iliajn inferajn kunvenojn. Kompreneble mi ne donos al mi la penon rebati tielajn senbazajn asertojn; la mensogon, absurdan, groteskan, oni ne refutas: ĝin oni preterlasas, ridante. Ho! tiuj germanaj fratoj niaj, kiuj pagas kotizon de 150 plus 50×12=750 markoj, t. e. 4500 frankoj; tondro! tiuj vere ne suferas pro la krizo. Sciu ankaŭ, vi profanuloj, ke ĉiu membro en ĉiu loĝio devas solene ĵuri, ke li prisilentos la framasonan sekreton *sub puno per morto*. Kaj kiu iam scios, *kiom da fiagoj* oni devas meti sur la konton de tiuj sindirantaj filantropoj? Kiu povus koni ĉiujn *murdojn* krimitajn de tiu institucio, kiu *stultigas k subpremas la popolon?* – Brrr! Tio estas vere terura, tremiga, abomena! Tial mi haltas, konsilante nur al nia K-do, ke li iom studu la historion de la framasonio en seriozaj verkoj, aŭ, se li ne havas sufiĉe da tempo por tion fari, ke li simple legu en nia *Plena Vortaro* la difinon pri la *framasono:* ĝi estas iom konciza, sed tre ekzakta. *H. B.*

Kiel mi havigos al mi belajn ilustritajn plurkolorajn
POŜTKARTOJN ?
kiuj simboligas la idealon
DE SAT
Serion de 5 tiaj artaj kartoj liveras kontraŭ pago de 0,50 mk. g.
Administracio de SAT
Leipzig O. 27, Kolmstr.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO
Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

Proklamo.

La Gvida Komitato de la Internacia Liberpensula Unuiĝo kun kontento ekscIis, ke la hispana registaro dekretis la nuligon de la Jezuita Ordeno en sia lando.

Kvankam ankaŭ en aliaj ŝtatoj ekzistas kontraŭ la jezuitoj leĝoj, kiujn Romo devas toleri, tamen la Papo provas ŝajnigi, ke la jezuitoj en Hispanujo estas martiroj, same kiel li provis pravigi la kontraŭrevolucian agadon de la katolika eklezio en Meksikio, fiprezentante la procedon de la meksika registaro kiel persekuton al religio.

Fakte nur la celado por la propra vivo devigis la junan hispanan respublikon sekurigi sin per ekstermo de ĉiuj sekretaj kaŝejoj de kontraŭrespublika agitado. Al tiuj kaŝejoj apartenas unuavice la Jezuita Ordeno k la sponta kontraŭeklezia movado en la hispana popolo sin turnis laŭ bona respublika instinkto precipe kontraŭ la jezuitoj.

Miloblaj ekzemploj ekzistas en la historio pri la pereiga socia agado de l' jezuitoj. Ni citu ci tie nur la batalon de la jezuitoj kontraŭ moderna lernejo, en Hispanujo siatempe fondita de Francisko Ferer (Ferrer). Oni lin mortigis pro tiu kuraĝa progresema entrepreno. Ne trankviliĝis la jezuitoj, ĝis ili per intrigoj ĉiuspecaj – pri kiuj ili tre spertas – atingis lian kondamnon k paf-mortigon.

Tiu sola faro de l'jezuitoj pravigas, ke ilia danĝera influo en Hispanujo radikale estu forigata. Sed ĉi tie ne temas pri puno pro krimoj iamaj, sed pri sekuro al socia progreso en la nuntempo.

Tial la Gvida Komitato de I. L. U. gratulas la repezentantojn de la hispana popolo pro tiu procedo kontraŭ la Jezuita Ordeno. Multo ankoraŭ estas farenda. La katolika eklezio, plej fidela apogo por monarkismo, en Hispanujo, postlasis malbonan heredaĵon. Sufiĉas ja citi la analfabetojn, kiuj svarmas plej abunde ĝuste en tiuj regionoj, kie la eklezia influo radikas en la popolo mem. Necesas tie multjara pacienca laboro, por fine forigi tiun mankon pri kulturo.

Tamen – farita estas la unua sukcesplena paŝo laŭ tiu direkto. Nun estas ebla al la hispanaj liberpensuloj, daŭrigi la de Francisko Ferer komencitan laboron. Ni liberpensuloj scias, ke religio havas radikojn sociajn k nia laboro celas racionalismon, estratan de veremo.

Instigate de tiu veremo, kiu ja estas nur unu el la formoj de justo, ni protestas kontraŭ ĉiuj trompaj artifikoj de l' klerikaro k per ĉiuj fortoj ni klopodos, subteni niajn samideanojn en Hispanujo sur ilia vojo al libero!

Por la Gvida Komitato de I. L. U.
(Internacia Liberpensula Unuiĝo).

La sekretario: *Th. Hartvig*. La prezidanto: *Dr. M. Tervanj (Terwagne)*.
La membroj de la Gvida Komitato: *M. Zivers (Sievers)*, Berlin, *Dr-o. B. Milde*, Prago, *Fr. Ronzal*, Vieno.

El „La Ateisto" N-o 4, 1. IV. 32.

Prireligia statistiko.

La Ekleziastiko *(Ecclesiastica)* publiĝikis en sia n-o 6 de l' 6. II. 32, la sekvantan interesan statistikon pri la religioj sur tero:

Romkatolikoj:	351 839 665	t. e.	19,0 %
Konfucianoj:	304 027 114	t. e.	16,4 %
Hinduanoj:	233 997 819	t. e.	12,6 %
Mahometanoj:	229 008 599	t. e.	12,5 %
Budhanoj:	199 461 632	t. e.	10,8 %
Protestantoj:	164 683 026	t. e.	8,9 %
Ortodoksaj:	131 460 822	t. e.	7,1 %
Idolanoj:	122 239 817	t. e.	6,6 %
Neeklezianoj:	76 598 195	t. e.	4,1 %
Ŝintoistoj:	16 644 437	t. e.	0,9 %
Judoj:	15 731 475	t. e.	0,9 %
Nekonatoj:	4 481 733	t. e.	0,2 %
Sume:	1 850 174 334	t. e.	100,0 %

Rilate al la diversaj kontinentoj la pocentoj estas jenaj:

	Afriko	Ameriko	Azio	Aŭstralio	Eŭropo
Romkatolikoj:	3,8	53,1	1,7	22	42,9
Konfucianoj:			30,5		
Hinduanoj:			22,5		
Mahometanoj:	37,1	0,1	17,9	0,1	1,8
Budhanoj:	0,1		20		
Protestantoj:	3,5	15,4	0,5	62,4	24,3
Ortodoksaj:	3,4	0,4	0,5	4,1	25,3
Idolanoj:	51,2	1	4,6	11,2	
Neeklezianoj:		27,8			2,2
Ŝintoistoj:			1,7		
Judoj:	0,3	1,8			2,3
Nekonatoj:	0,6	0,4	0,1	0,2	0,6
	100	100	100	100	99,4

11 761.

El Germanio.

Laŭ ordono de la prusia kultministerio neeklezianoj-juninstruistoj dume ne plu estos dungataj en publikaj lernejoj.

Proceso, komencita pro tio de la „Germana Liberpensula Unuiĝo“ k la „Universala Libera Instruist-Sindikato“ kontraŭ la prusia ŝtato, estas perdita en la dua instanco antaŭ la supera kortumo en Berlin.

Laŭ „La Fajrero“ (1. 5. 32).

En la subŝtato Brunsvigo (Braŭnŝvajg) la nacisocialista ministro Klagges ordonis la malpermeson de la bone funkciintaj laikaj lernejoj. Liaj pretekstoj estis sufiĉe stultaj k senĝenaj: „La instruistoj de la laikaj lernejoj malbone plenumis sian oficon. El la lernejoj ili faris karikaturon de l' germana popollernejo. En multaj klasoj regas pedagogia ĥaoso. La infanoj estas edukitaj al nesufiĉa devo-konscio.“

Laŭ „La Liberpensulo“ (1. 5. 32).

La plej trafa respondo.

En nia urbeto mortis komunistino, ankoraŭ membro de l'eklezio. La ĉefpastro unue rifuzis partopreni la entombigon: „Komunistinon mi ne entombigos!“ Tamen li fine konsentis paroladi ĉe la tombo. Tie li alparolis la ĉeestintajn Gek-dojn: „Ĉiuj vi, sendiuloj, kiuj vi estas kunvenintaj ĉi tie!“

La respondo al tia impertinenta parolado ne estis prokrastita longe. Dum baldaŭ okazinta kunveno granda parto de l'partoprenintoj decidis eksiĝi el la eklezio. Eksiĝis tiam 14 virinoj, 10 viroj k 7 infanoj. Ni nun klopodas instigi pliajn Gek-dojn, por ke ili eksiĝu.

16 900.

El Usono.

Superstiĉo.

Dum la „simi-proceso“ en Detn-Tenesi (Dayton-Tennessee) miris multaj liberpensuloj pri la fakto, ke instruisto, klariginte al siaj lernantoj la evolu-teorion de Darvin, estis eksigata el la ofico, akuzata k kondamnata. — Jen pruvo pri la animstato de multaj instruistoj en Usono, precipe en la sudaj ŝtatoj:

Profesoro O. A. Boŭdn (Bowden) de la ŝtata instruista seminario en Nov-Meksiko, faris enketon ĉe instruistoj, negocistoj, metiistoj ktp. pri la demando, ĉu ili kredas, ke veterŝanĝoj k sanigoj povas esti atingataj per preĝado. — En la lasta kongreso de la Usona Instruista Unuiĝo en Nov-Orleano li publikigis la rezulton de la enketo: El 100 instruistoj 78 kredas al sanigoj per preĝado. Inter la aliaj profesioj 76 jesis la demandon.

Laŭ „La Fajrero“ — 11 761.

Pri la kontraŭeklezia batalo en Meksikio.

Je la 21. 12. 1931, por la urbo k la ŝtato Meksiko estis dekretita, ke la nombro da pastroj en tiu ĉi distrikto ne estu pli alta ol 25; same la nombro da eklezioj havantaj permeson fari diservon estis fiksita je 25. Laŭ tiu dekreto do estas fermotaj 260 preĝejoj k kapeloj ĝis nun uzitaj por diservo.

Sama dekreto por la ŝtato Malsupra Kalifornio difinas la nombron da pastroj en tiu distrikto je 2.

Laŭ onidiroj ankaŭ en la ŝtato Jalisko oni intencas dekreti, ke la nombro da pastroj estu nur po du por 100 000 loĝantoj.

En la tutmeksikia parlamento, la deputito *Davila* proponis esprimi malaprobon al la gubernatoro de l'ŝtato Oaksaka, *Francisko Bopez Cortes*, ĉar ties edzino kunlaboris en komitato por pilgrimado. Same oni esprimu malaprobon al ĉiuj publikaj oficistoj, kiuj toleras la katolikan kredon en sia domo. La propono estis akceptita.

Laŭ katolika fonto 16 900.

551 petskriboj al la Vatikano por sanktuligo k beatuligo.[1]

Ne malpli ol 551 proponoj por sanktuligo k beatuligo estas senditaj al la Vatikano el la diversaj popoloj: 57-oble oni petas la sanktuligon, 494-oble la beatuligon. Interesa estas la nombro el la diversaj nacioj. Proponitaj kiel sanktuloj k beatuloj estas: 6 germanoj, 1 aŭstro, 116 francoj, 6 angloj, 1 ĉeĥo, 13 belgoj, 2 svisoj, 3 irlandanoj, 55 hispanoj, 2 holandanoj, 271 italoj, 6 hungaroj, 4 jugoslavoj, 4 portugaloj. Ho ve! kie restas la rusoj? Ĉu ili eble mem rezignis? Ni kredas, ke jes. Sed ne nur Eŭropo havas ĉielanojn. 12 usonanoj, 2 mez- k 21 sudamerikanoj, 24 azianoj k 2 aŭstralianoj estas maturaj por ĉielaj rezervitaj sidlokoj.

Ho ve! kion diros Hitler? Ĉu li ne riproĉos al Brüning? 116 francoj k nur 6 germanoj. Terurega afero! Ĉu la francoj eble estas favoritaj, ĉar ili jam delonge havas la disigon de ŝtato k eklezio?

W.

[1] *Beata* (feliĉega); angle: *beatified*, france: *béat*, germane: *selig*.

Stalin pli bone fartas per pano ol per preĝoj.

Por esti sufiĉe informata mi legas ne nur avangardajn, sed eĉ reakciajn gazetojn, el kiuj ne malofte mi ĉerpas tre interesajn kontraŭdirojn. En portugala reakcia ĵurnalo „O seculo“ de 2. 4. 32 oni raportas pri portugala soldato, kiu antaŭ kelkaj jaroj entreprenis piedvojaĝon tra Eŭropo kun kelkaj amikoj, kiuj mortis dum la vojaĝo pro la klimato.

Reveninte al Portugalio li raportis, ke dum vizito al Romo li petis gastigon ĉe la papo, kiu konsentis ŝirmante lin dum 15 tagoj en la pilgrima hotelo. Poste li trapasis aliajn landojn, kies estraroj eĉ pagis al li la gastelspezojn. Sed en Sovetio oni postulis de li, tute senmona, ke li laboru almenaŭ 4 horojn ĉiutage ĉe fervoja konstruado por rajti konsumi. Li konsentis, kvankam grumblante, por 30 tagoj k povis dum tiu tempo rimarki, ke tie ne ekzistas nudpiedaj nek ĉifonitaj homoj; sed li aldonas, ke tamen li ne kredas al longtempa daŭro de l'reĝimo, ĉar tie mankas pastroj k preĝejoj estas transformataj en ŝtatajn grenejojn, al kiuj la laboristoj iras por sin provizi . . . Mi emas kredi, ke se Stalin gastigus lin tiel parazite kiel la papo, li *certe* kredus al longtempa daŭro de l'reĝimo. Bedaŭrinde por li, li ne eksciis antaŭe, ke „ĉe Stalin tiu, kiu volas manĝi, devas labori“, dum ĉe la papo „sufiĉas *preĝi*“, por ke la fruktoj falu de la ĉielo tute maturaj. Konklude li diris, ke ĉe sia reveno trapasante Hispanion, ankaŭ tute senmona, li estis devigata tie labori en minejoj por manĝi, sed li forgesis precizigi, kiom da horoj oni laborigis lin ĉiutage; pri tio mi mem povus diri miajn spertojn: Por ajna laboro la *minimuma* daŭro estas 8—12 horoj.

Kiomfoje tiu kompatinda soldato sopirus la sovetiajn 4 horojn! Se li ja estas ambicia! Tiutempe, en Sovetio, li sendube preferis la papojn k tial vizitis preĝejojn por rakonti al ekleziaj reprezentantoj sian ĉagrenon, sed . . . feliĉe li nur trovis *panon*.

Soares.

Por via perfektigo la plej taŭga legaĵo:

UNUA LEGOLIBRO

SAT-eldono. 104 pĝ. Prezo: 1 mk.g.

Administracio de SAT, Leipzig O. 27.

TRA ESPERANTIO

Respondo al publika letero XI.

Amsterdam, 16. VI. 1932.

Estimata K-do Lanti!

Preskaŭ ĉe ĉiu via publika letero mi estis incitita, ensendi respondon, sed mi tion neniam faris, ĉar mi ne taksis tion sufiĉe necesa. Mi tion tamen nun faras, leginte vian XI-an leteron, ĉar mi opinias, ke ankaŭ tiuj, kiuj ne samopinias kiel vi pri la priparolitaj aferoj havas rajton influi k instigi la spiritojn antaŭ la kongreso en Ŝtutgart.

Se mi volus refuti ĉiujn nelogikaĵojn k kontraŭdirojn en viaj publikaj leteroj, mi bezonus almenaŭ tiom da loko, kiom vi mem uzis por vi. Mi tial volas elpreni kelkajn punktojn, nome tiajn, kiuj ŝajnas al mi plej gravaj. Viaj argumentoj kontraŭ la kritikantoj de la duobla kotizo en la esperantomovado estas sensignifaj k per kelkaj vortoj refuteblaj. Mi pagas por partio, sportmovado, sindikato, kulturmovado, *po*unu kotizon, sed por esperantomovado du kotizojn. Kial do mi ne ankaŭ pagu por partio, sport-, sindikato- k kulturmovado po du aŭ pli da kotizoj? Tio estus absurdaĵo, same kiel ĝi estas en esp.-movado. Tute ne estas vere, ke estas necesa pagi al ĉiu movado apartan kotizon ĉar ĉiu havas apartajn celojn. Demandu aŭstrianojn, en diversaj urboj ekzistas laboristaj kulturkarteloj al kiuj la laboristo pagas nur *unu* kotizon k per tio estas ano al ĉiuj ligoj laboristaj. Se per taŭga kunligo de la LEA-oj estas kunigitaj en SAT ĉiuj lab. esp-istoj, kiuj nun estas organizitaj, tiam estus multe farebla, ĉu en propaganda direkto, ĉu en kleriga. Tiam la gazeto povos ĉiujn[1] atingi, ne kiel nun, nur malgrandan parton. La „dukotiza afero“ estas eble laŭ via opinio likvidita, sed cetere ne, tion vi bonvolu noti. Ankaŭ viaj argumentoj kontraŭ la delegitsistemo k pri la tielnomata demokrateco en SAT k ĉe la kongresoj estas absolute malfortaj k nekonvinkaj. Vi skribas, ke, se regus delegitsistemo, venus al la kongresoj nur tiuj, kiuj scias bone paroli k oratori, k granda parto de la landaj LEA-anoj, laŭ vi aŭ diletantoj aŭ senlaboruloj (?!), tamen ne havas influon demokratecan al la movadaj aferoj. Ĉu vi do estas tiel konvinkita, ke dum la nuna sistemo venas al la SAT-kongresoj efektive nur tiuj, kiuj estas la veraj k taŭgaj gvidantoj de landa k internacia movado? Tute malprava aserto. Se ekzistas delegitoj, kiuj ricevas de siaj landaj grupoj la komision defendi antaŭ la internacia forumo la opinion de la *plimulto* en la asocio k oni elektas delegitojn tiajn, kiuj ankaŭ scias paroli k defendi siajn opiniojn, nur tiam estas ebla dum la kongresoj vere fruktodona laboro. Ne estas vera, ke tiuj, kiuj nur ankoraŭ malbone scias la lingvon, ke ili en la landaj organizoj tamen ne havas la rajton, ili povas paroli nacilingve, se ili ankoraŭ ne scias diri siajn opiniojn esperantlingve, ion, kion ili dum SAT-kongreso ne povas fari. Tie ili balbutas k nenion sukcesas por sia afero. Tiel aspektas la nuna stato, la SAT-kongresoj en nuna formo estas babilejoj, kiuj absolute ne alportas ion vere valoran por la tutmonda lab. esp. movado. Oni ankaŭ argumentis kontraŭ ni, ke estas malbone, se nur delegitoj venas al la kongresoj, ĉar tiam la simplaj anoj, kiuj ne estas delegitaj ne plu povas partopreni kongresojn. Kial ne? La internaciaj lab. Esperantokongresoj estu laborkunvenoj de la LEA-oj k krom tio granda manifestacio de lab. esp. movado, kiun partoprenu ĉiu esperantisto lab., kiu nur iel povas. Tiuj du aferoj estas bonege kunigeblaj. Okazu internaciaj lernejoj, klerigaj paroladoj k lumbildprezentadoj k tiu unu kongressemajno estos fruktodona por ĉiuj LEA-oj landaj, el kiuj ja finfine konsistas la tuta lab. esp. movado. Ne SAT estas *la* lab. esp. movado sed la LEA-oj. Montriĝas bone, ke la SAT-gvidantoj komencas lastatempe kompreni tion. Ĉar kial venis rubriko en nian gazeton „Ĉe la Lab. Esp.-Asocioj?“

Estus ankoraŭ multo sur mia koro, kion mi volus al vi diri, sed mi ne volas tro multe foruzi la spacon k paciencon vian. Mi nur ankoraŭ volas substreki, ke la gazeto en sia nuna enhavoformo ne estas taŭga por lab. esp. movado, nek klerige, nek informe. Al la diablo jam foje kun tiu malbenita supertendenceco, kiu en vero tute ne ekzistas. Ĉu mi bezonas legi en gazeto, kiu prezentas al mi kiel kleriga organo, ke tie la komunistoj faris tiun stultaĵon k alie la soc. demokratoj agis fie kiel burĝoj k denove aliloke la anarĥistoj elverŝas sian galon super la aliaj partioj perfidaj? Socialisto tamen ne kredas, kion skribas komunisto k komunisto ne kredas, kion skribas socialisto k anarĥisto ne kredas, kion la du aliaj skribas. Do, kian valoron la tuta malbona miksaĵo havas? Nenian.

K-do Lanti, mi estas konvinkita, ke vin mem miaj vortoj ne multe tuŝas, sed mi direktis ilin ne nur al vi k mi estas tre scivola pri la eĥo. Mi finas substrekante, ke mi nur tute mallonge povis tuŝi la problemojn k ke mi estas forte konvinkita, ke SAT, se ĝi ne ĉijare aŭ venontjare ŝanĝas sian strukturon, tamen ĉiam pli estos pelata per la neceso de la evoluo al la ĝusta vojo, nome, kunligo de la LEA-oj!

Kamarade vin salutas

Klatilino.

[1] Estas domaĝe, ke la verkintino ne diras kiom alta devus esti tiu *unusola* kotizo. — *Red.*

Mallonga rimarkigo. — Mi volonte kredas, ke K-dino Kl. estis forte incitata, kiam ŝi skribis sian respondon. Por ne pligrandigi ŝian incitiĝon, mi simple petas al la legantoj, ke ili bonvole relegu, kion mi jam skribis pri la demando; poste ili decidu mem tute trankvile, ĉu jes aŭ ne K-dino Kl. refutis miajn „nelogikaĵojn“. Kaj en jesa okazo ili petu, ke ŝi faru konkretajn proponojn por aliigi nian organizon en Internacion.

Mi esprimis mian opinion k tiun de multaj aliaj K-doj; sed estas evidente, ke se la plimulto el la SAT-anoj samopinias kiel K-dino Kl., mi estas tute preta forlasi la gvidpostenon. Kaj tion mi faros eĉ kun granda kontento. La aliaj P.K.-anoj ankaŭ kredeble. Dume ni defendas nian vidpunkton k aplikas nian sennaciecan, senpartiecan Statuton. — E. L.

Al la posedantoj de akcibiletoj de la Eldonkooperativo de SAT!

Gek-doj! Kiam siatempe ni starigis la bazon por la libroeldonado de SAT en kooperativa formo k eldonis du seriojn da akcioj (antaŭ ĉ. 8 jaroj), la mondo estis skuata de inflacioj k malstabilaj monvalorigoj, jen tie, jen alie. En tiu tempo rentumiĝo 10-%-a por tiaj valorpaperoj, kiaj la akcioj de kooperativo, estis normala k kutima. Sed hodiaŭ tia procento ne plu respondas al la ekzistantaj monaj kondiĉoj. En ĉiuj entreprenoj okazis sufiĉe grava redukto de l'procentaĵo k de l'interezoj.

Por fini la nenormalan kondiĉon en nia kooperativo, ni decidis, ke de post la 1. julio 1932 la rentuma procento por la akcioj de la kooperativo estas 6% *(anstataŭ ĝis nun 10%). La ceteraj kondiĉoj restas neŝanĝitaj.*

Ni rememorigas ĉi-okaze, ke momente la kontanta elpagado de la akcia valoro estas interrompita pro la malfacila financa situacio, k ke la akcioj nuntempe havas nur la valoron de pagilo en la rilatoj kun la administracio (por libromendoj, kotizoj ktp.).

Direkcio de SAT. Eldona Fako Kooperativa.

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Aŭstrio. La kleriga centro de l'socialdemokrata partio konsentis en la proksima parolada sezono rekomendi al la distrikt-organizoj paroladojn pri la signifo de esp-o. La esp. grupo de l'Vienaj tramistoj estas subtenata nun ankaŭ materie de sindikataj instancoj. (Laŭ „La Socialisto“). **Belgio.** La

lab. esp. grupo en *Liego* organizis dum pentekosto en la popoldomo sian unuan intern. konferencon; preskaŭ 150 alilandaj kongresanoj kunvenis por ekzameni la progreson de nia afero k studi la diversajn instrumanierojn. Dum la du tagoj la K-doj kreis inter si firman amikecan ligon. K-do Maŭric (Germ.), kiu prezidis, konkludis: „Kiam ni estos hejme, ni diros al niaj parencoj k amikoj, ke la belgaj K-doj ankaŭ estas homoj, ĉar la kapitalismo diris al ni, ke ili ne estas homoj.“ – La 31-an de julio okazos, kiel sciigas „Le Prolétaire“ (Liego), en Maestriĥt, holanda urbo proksime de la belga k germana landlimoj, interlima manifestacio kontraŭmilita, kiun partoprenos oficiale lab. esp-istoj el tiuj tri landoj. Germanio. La unua Badena esp. renkontiĝo okazis la 24. IV. en Durlaĥ. Ĝin partoprenis 50 Gek-doj. K-do Hlavas (Karlsruhe) salutparolis, K-do Weimar (Frankft.) faris propag. paroladon. Oni vendis specialajn festpoŝtkartojn. Okazis diskutado pri varbado, kursoj ktp. Posttagmeze venis la naturamika grupo el Durlaĥ, kies sekcio estas la loka esp. grupo, k K-do Weiler parolis pri la urbo k regiono. Poste estis malgranda ekskurso kun ludo k kantoj. El la festpoŝtkartoj oni povas havigi al si ankoraŭ kelkajn, kontraŭ pago de 0.10 mk. por peco al K-do Weiler, *Durlach*, Pfinzstr. 99. – La ĉijara tutsaksia LEA-renkontiĝo okazis en Meissen. Ĝi komenciĝis per publika varbvespero. Dimanĉe, 5. VI., okazis la distriktkonferenco vizitata de 300 Gek-doj. Ankaŭ kelkaj ĉeĥoslovakaj Gek-doj ĉeestis. Oni ĉefe tuŝis internajn organizaferojn. Flanke de asocia estraro sekvis raporto. Ankaŭ ne mankis la kutima malica atako kontraŭ SAT. Citinde estas, ke la LEA-estraro emas forigi la distriktestraron de Orientsaksio, ĉar ĝi estas opozicia al la nuna taktiko de LEA. La problemo tamen ne solviĝis. Cetere ĉiuj diskutantoj el Orientsaksio parolis kontraŭ la sinteno de LEA. – Post la konferenco formiĝis impona manifestacio tra la urbo. (W. Krey, 5486). – **Portugalio.** K-do H. Platiel (Leipzig) paroladis la 9. V. ĉe la *Lisbonaj* lab. esp-istoj k varbis por SAT. Pri tio aperis granda raporto (kun portreto) en la n-o 4-a de „La Okcidentulo“ (eldonaĵo de *Ligo de l'Okcidentaj Espistoj).*

DIVERSAJ NOTOJ

Ferivizitoj.

Pasintjare oni proponis feriinterŝanĝojn. Por montri, ke esp-o ne nur estas lingvo por interŝanĝi poŝtkartojn, verki gazetojn k leterojn, sed la ilo por disrompi la lingvajn barojn k starigi amikecon inter „fremdlandanoj“, necesas praktika uzado. Krom kunvenoj en tendaroj internaciaj, sennaciaj, kie ne plu malhelpas la diverso de la lingvoj, la reciproka vizito inter Gek-doj diverslandaj povas ebligi la personan interkonatiĝon. Treege necesas tiuj personaj interligoj, interrilatoj en nia movado. – Pri la sukceso de la pasintjara varbado tiucela mi nenion aŭdis. – La Gek-doj en Magdeburgo k ĉirkaŭaj vilaĝoj estas pretaj gastigi Gek-dojn eksterlandajn unu aŭ du semajnojn. Sola kondiĉo estas antaŭa korespondado. Skribu al *Oto Koldic, Magdeburg-S, Fuchsberg 3 a.* *(14 624).*

IFETT-Konferenco.

En Praha okazos je la 11. k 12. aŭgusto internacia konferenco de la Internacia Fed. de Esp-istaj Trafik- k Transport-laboristoj (IFETT). Partoprenemuloj anoncu sin ĉe K-do Jos. Pech, Houŝkova 4, *Plzen*, Ĉeĥoslovakio, kiu prizorgas la loĝej-aferojn ktp. Detalajn sciigojn donas la Internacia Oficejo en *Wien*, Geistingerg. 1, 6/16.

EKSTER NIA MOVADO

Gvidantaj polaj esp-istoj alvokas la tutmondan esp-istaron al la organizado de interŝtata plebiscito (popolara voĉdono) por esp-o. Per komuna agado la ŝtatoj estu instigataj promesi pogradan enkondukon de esp-o en lernejoj (devige) k la plej diversaj societoj subtenu siaflanke la pledon ĉe la klerigaj ministerioj.

La Estonia ŝtata registaro decidis (18. II.) permesi al ŝtataj oficistoj, sciantaj esp-on, porti sur uniformo esp. insignon surbruste maldekstraflanke.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

B. Kandidov, Eklezio k Oktobra Revolucio. El la rusa trad. *I. Miŝin.* Ekrelo, Leipzig. 1931. – 30 pĝ. Form. 11×14. Prezo 0.20 mk. g.

La aŭtoro priskribas la rolon de la eklezio antaŭ la revolucio, dum la revolucio, la rolon de l'patriarko Tiĥon, kiu organizis la batalon kontraŭ la soveta regado, la eklezian fuŝagadon dum la malsatego en 1921, en Siberio, ĉe la militfrontoj helpe al la blankaj armeoj. La lingvo de l'traduko estas klara k bona.

Sten Bergman, Tra sovaĝa Kamĉatko. Tradukis el la sveda *Birger Gerdman.* Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 276 pĝ. Form. 14×21. Prezo broŝ. 4,50 sv. kr., tole bind. 6 kr. Vivoplena rakonto pri aventuraj veturoj dumvintraj tra nekonata lando kun strangaj popoloj. Ilustrita k presita sur bela papero.

M. Ŝejnman, Moralo religia k Moralo proleta. El la rusa trad. *P. Gavrilov.* Ekrelo, Leipzig. 1931. – 30 pĝ. Form. 11×15. Prezo 0.20 mk. g.

Eklezio estas nepre necesa por la savo al la homaro, diras la pastroj; sekve ĉio, kio servas al la Eklezio, estas morala k bona. Partio estas nepre necesa por la savo al la Proletaro, diras Ŝejnman, k sekve ĉio, kio servas al la Partio, estas morala. Tia kompreno pri moralo estas simpla k facile komprenebla eĉ de neinteligentaj homoj. Pri la rezultoj de tiaj „moralaj“ principoj oni observu tion, kio okazas en eklezioj k partioj.

Leono Vienano: Esperanto per Esperanto. Lernolibro laŭ rekta metodo. Eld.: N. Ŝapiro, Varsovio, Nowolipki 8. Form. 13×18. – 68 pĝ. Prezo z. 1.75 aŭ 0.20 dol. (Poŝtĉeko: 16 562, Warszawa).

Libro prilaborita laŭ la metodo de nia „Petro“, sed malpli ampleksa k ne bazita sur kontinua rakonto. Mankas la pritrakto de kelkaj lingvaj k gramatikaj formoj. Ni notis la rekomendon de „-io“ kiel finaĵon por landnomoj. La preso estas iom primitiva, k ne ĉiuj el la multaj preseraroj estas korektitaj en la aldonita folieto. Sur p. 33 (piednote) estas erar-uzita „okazi“ anst. „esti uzata (aplikata)“. *N. B.*

La Simpla Esperanto. Lernilo por hungarlingvanoj en 16 facilaj lecionoj de *d-ro Szilagyi Ferenc.* Eld. Literatura Mondo, Budapest. Prezo (kun hung. ŝlosilo) 0.26 dolaro. 40 pĝ. Form. 15×22.

Ne konante la ĝisnunajn hungarlingvajn lernilojn, mi ne scias, ĉu ĉi tiu estas la plej bona; almenaŭ estas konstatinde, ke la libro malgraŭ sia negranda amplekso entenas multe da instrumaterialo, kiu estas lerte prezentita kun belaj, plejparte amuzaj ilustroj. La perbilda instrumetodo sin trudas. La landnoma finaĵo rekomendata estas *lando.* *N. B.*

Nyckel till Esperanto. 32 pĝ. Form. 7×10½. Prezo 10 oeroj. Laŭ la normoj de I. C. K. eld. Eldona Societo Esperanto, Stockh. (9-a eld.) – La konata „Ĉefeĉ“-ŝlosilo por *sved*lingvanoj, tre klare presita. En malpli ol 2 jaroj estas venditaj da ĝi 20 mil ekz-oj!

Hillar Sakaria: Enkonduko en la pedagogion (Historia skizo). Eld. Esp-Instituto de Estonio, Tallin. 20 pĝ. Form. 11×18. Prezo: 0.50 mk. g. aŭ egalvaloro. – En tre konciza, sed klara k komprenebla formo estas skizita la evoluo de l'pedagogio, k ĉiuj eminentaj pedagogoj, de Sokrato ĝis nia epoko, pasas antaŭ ni kiel en enciklopedio, k ni ekscias pri tio, kion ili faris por la progreso en la eduka fako. Tre rekomendinda k utila broŝuro. *N. B.*

M. Kidosaki, Zamenhofa Legolibro: Kolekta eldono. Japana Esp.-Instituto, *Tokio*-Uŝigome. 1931. – 144 pĝ. Form. 13×19 cm. Prezo: 1.50 sv. fr.

Tre bele presita estas tiu ĉi libro, kiu entenas ekstraktojn el originaloj k tradukoj de Zamenhof k ankaŭ diversajn artikolojn *pri* la aŭtoro de esp-o. Aldonita estas bela portreto.

Kazimierz Smogorzewski: Pol-Pomeranio. Trad. el la franca S. Grenkamp. 130 paĝoj. Formato 17×25. Eldonejo Esperantista Voĉo, *Jaslo* (Polio). Prezo: fr. sv. 2.50.

Kiu ne ankoraŭ povas imagi al si senlandliman socion k kiu sekve interesiĝas pri problemoj de ŝtatlimoj k de nacia supereco, ligitaj kun imperiismaj interesoj k politika disdivido de teritorioj, en kiuj estas parolataj du aŭ pli da diversaj naciaj lingvoj, tiu trovas en ĉi tiu libro (ilustrita per 22 entekstaj k 4 plurkoloraj ekstertekstaj kartoj) abundan dokumentan materialon. Unu el la esencaj konkludoj de l'aŭtoro estas, ke „*Pol*-Pomeranio garantias la sendependon de Polio“ k „naciistoj ĉu socialistoj (t.e. en Polio – N. B.) estas absolute konvinkitaj, ke la germanapolaj limoj estas humane justaj, politike vivipovaj, ekonomie sanaj. Se tiu mallarĝa fenestreto ... estus minacita, tiam ĉiuj polaj civitanoj defendus ĝin per ĉiuj rimedoj, kiel oni defendas tion, kio estas la plej kara en la mondo: la rajton al vivo.“

La traduk-lingvo estas bona; evititaj estas malnecesaj neologismoj. *N. B.*

Okamoto-Rikici: Evangelio de Sinkompletigo. Belisma Koopera Kulturejo. Adr. de l'aŭtoro: Tomioka-mura, Ŝuntoo-gun, *Ŝizuoka-ken*, Japanio. 43 pĝ. Form. 12×18. Prezo 0.25 jen-o.

En ĉi tiu VI-a volumeto de sia „evangelio“ O-Rikici asertas, ke la naturo ekregas plene nur kiam la spirita korpo (t. e. ia senmortaĵo) estas *kompletigita.* Sinkompletigo estas la tasko de Belismo. Belismo estas antropologio k nova religio sen temploj. „Kvankam en Belismo ne ekzistas idolo nek rito, tiu, kiu postulemas formalon, intuiciu, sinekzamenu, pursentu k sin konfirmu aŭ antaŭ aŭ post manĝado aŭ ĉe en- aŭ el-litiĝo.“ Cetere la aŭtoro opinias, ke ĉiuj ĝisnunaj privivaj konceptoj estis eraraj; nur ĉi tiu lia evangelio estas la vera vero! ! *N. B.*

La Internacia Labora Organizaĵo. Konstitucio, Agado, Rezultatoj. Int. Labora Oficejo, *Ĝenevo*, 1932. – 8-paĝa faldprospekto, kiu klarigas la funkciadon de la Internacia Labor-Oficejo k montras per karto ĝian disvastiĝon.

Serrurier: Vers l'unité d'action du prolétariat par son unité organique Edit. „Pour le prolétariat“, 47, rue Charles Meert, Bruxelles. 104 p. Form. 12×17. Prezo ne indikita.

La Memoron PLIFORTIGAS k PERFEKTIGAS laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio Prof. de mnemoniko D. FAJNŜTEJN-VILNO, Zawalna 15 (Pollando).

Dank' al mia metodo, bazita sur leĝoj de **psikologio, fiziologio, logiko k pedagogio, la MEMORO restariĝas** ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, **pliboniĝas** ĉe tiuj, kiuj havas malbonan k **perfektiĝas** ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe **foriĝas la DISTRECO k maldiligento, fortiĝas la VOLO k pliboniĝas ĉiuj psikaj kapabloj** ĉe personoj **ĉiuaĝaj.**

Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en esperanto.

RADIO-PROGRAMO:

30. junio:
22.05–22.15: Valencia, 266 m, babilaĵoj (samhore: 7. 7.)
22.30–22.40: Breslaŭ-Gleiwitz, 10 min. esp. por laboristoj (same: 7. 7., 14. 7.)
2. julio:
20.15–20.25: Lyon-la-Doua, 466 m, parolado (same: 9. 7., 16. 7.)
5. julio:
20.00–20.10: Tallinn, Tartu, informoj (same: 12. 7.)
22.05–22.30: Leningrad, 1000 m, informoj (same: 12. 7., 15. 7.)
7. julio:
21.00–21.20: ? Kaunas – parolado.
16. julio:
18.40–19.00: Bratislava, 278,6 m, historio de l'slovaka popolo.

SAT en Britio.

Ĉiu lojala SAT-ano en Britio aliĝu al SATEB por starigi fortan asocion, kun jenaj celoj: 1) Varbi por SAT, 2) organizi propagandsekciojn en diversaj sindikatoj ktp., 3) disvastigi la propagandon ĉe la tuta laboristaro en Britio.

Petu informilojn de *SATEB, 13, Dewsbury Rd., London N. W. 10.*

NIA POŜTO

J. S. P. – Via informo havas nur lokan intereson; aliparte, kial do kulpigi la pastron? La gepatroj estas unue kulpaj: kial do ili sendis siajn infanojn al pastroj? Tiaj uloj ne ekzistus, se forestus kreduloj. – *E. L.*

10 634. – Gratulon pro via fervoro! ... Sed la poemoj, malgraŭ la bona intenco, ne havas sufiĉan literaturan valoron por aperi en „LNE".

La pliperfektigita Heroldo

trovas la aplaŭdon de ĉiu abonanto. Ĉu vi jam vidis numeron el 1932? Se ne, petu senpagan specimenan numeron. Pli bone estas, se vi mendas provabonon por unu monato je la prezo de 0.80 gmk. aŭ 1.— svfk. Dum tuta monato vi havos okazon, prijuĝi la semajnan organon de la Esperanto-movado. Krome vi rajtas enpresi senpagan korespondanonceton. Post unu monato vi fariĝos daŭra abonanto! Samtempe postulu katalogojn pri esperanto-literaturo.

Mendu ĉe la Administracio de „Heroldo de Esperanto", *Köln*, Brüsselerstr. 94, Germ.

Lea-grupo Schiedam (Holando).

Okaze de la unujara ekzistado – 24. VI. 32 – de la grupo ni aranĝos letervesperon. Gekdoj, skribu multnombre, ni certe respondos.

Adreso: C. v. Gink, Prins Mauritsstraat 24, SCHIEDAM-Holando.

NEKROLOGO

Mortis pro stomaka malsano
K-do Viktor Juŝkeviĉ

el Sovetio. Li havis la SAT-matrikulon 5041 k estis fervora membro, pri kies morto tre ĉagreniĝas tute aparte pluraj amikoj de SAT en Sovetio. Honoron al lia memoro!

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L=letero, PK=poŝtkartoj, PI=poŝtkartoj ilustritaj, PM=poŝtmarkoj, bfl.=poŝtmarko sur bildflanko, kĉl.=kun ĉiuj landoj, esp-aĵo=esperantaĵo.

BRITIO

K-dino *M. Shanley*, 21, Summer Str., *Nelson*, ricevis tiom da let. pro sia anonco, ke ŝi bedaŭrinde ne povas respondi al ĉiuj.

FRANCIO

K-do P. Chirol 25 rue Parmentier, *Drancy* (Seine), L. PK. PM, ĉefe pri klasbatalo, radio, sporto kĉl.

GERMANIO

K-dino Klara Schille, Roonstr. 17, *Reichenbach i. V.*, koresp. kun eksterlandaj K-dinoj.

15 gekursanoj de grupo Potsdam aranĝos la 30. 6. 1932 letervesperon. Gek-doj skribu multnombre! Resp. gar. Adr.: K-dino Rettke, Priesterstr. 18, *Potsdam.*

10 SEA-grupanoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. nepre garant. Skribu multnombre al: K-do Georg Hönninger, Am Amselschlag 30, *Fürth/Bavario.*

Kelkaj esp. lernantoj, kiuj ĵus finis la kurson koresp. kĉl, L, PI, PM, fotoj, esp-aĵoj. Adr.: Diedr. Rickens, Seilerstr. 22, *Bremen.*

Laborista Esperanto Grupo serĉas por siaj membroj eksterl. gekorespondantojn. Resp. garant. Adr.: W. Höfer Amalienstr. 73, *Fürth Bavario.*

Balkanlandanoj atentu! – Sat-ano 15 413 (Hohenstein-E.) intencas ĉi tiun someron travagadi viajn l. Eluzu la okazon konatiĝi kun eksterlandano.

Socialista Esp. Grupo koresp. kun alia grupo. Al ĉ. ni nepre unufoje resp. Pref. temoj: politiko, ateismo, sporto; interŝ. fotojn, gaz., esp-aĵojn. Skribu al: Walter Dietze, Rossplatz 9, *Liebertwolkwitz ap. Leipzig* (por Soc. Esp. Grupo).

K-dino K. Schröter, *Lomnitz 162 i. Rsgb.*, kun Gek-doj el ĉ. landoj, pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

10 Gek-doj el la grupo (Neckargartach) koresp. kĉl. Certe resp. Adr.: Richard Heller, *Neckargartach/Wttbg.*

LITOVIO

K-do V. Rakauskas, *Videniŝkiu p.* as, Varniŝkis, kĉl, interŝ. PM kun legantoj de „La Lernanto".

NEDERLANDO

K-do M. v. d. Horst (18 j.), Rösener Manzstrato 156, *Rotterdam*, kĉl.

K-do J. C. Verboekent (librotenisto, 25 j.), Bilderdijkstr. 35-bis, *Utrecht*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI.

K-do A. Huisman, Zeeburgerdyk 148 huis, *Amsterdam (O)*, kun Gek-doj ĉl., Nepre respondos.

SOVETIO

K-dino *Ola Logwin*, Komsomolska 58, *Lubni*, Ukrainio, dez. ricevi interŝ. SAT-jarlibrojn el jaroj 1928, 1929/30, 1932.

K-do *N. S. Osipov*, Tverskaja 29, kv. 53, *Moskvo-9*, dez. kor. k interŝ. librojn k muziknotojn.

K-do Voldem. *Gric*, Potapovskij per 5, kv. 14, *Moskvo-C.* (22-j. telefonteknikisto), prefere kun fotoamatoroj el ĉl.

K-dino *Vajnbaŭm V.* (21-j.), konstru-studentino, ul Engelsa 10, Baku, stenogr. dez. kor. kĉl, pĉt.

USONO

Adresŝanĝo. – K-do Maxim Rummel, Hunter Str. 422, Long Island, loĝas nun: 587 Park Ave., *Brooklyn, N. Y.*, bv. noti tion en jarlibro.

PROLETARO TUTMONDA!

Vizitu nin, skribu aŭ sendu materialon okaze de nia 20-jara grupfesto la 6. k 7. de aŭgusto. Ni speciale bezonas politikan k pedagogian materialon por nia ekspozicio. Ni garantias respondon k tranoktejon!

Espero-Wurgwitz (Dresden).

Al Prof. de mnemoniko
D. Fajnŝtejn en Vilno:

Estimata Sinjoro Profesoro!

Antaŭ tri semajnoj mi finis vian perkorespondan memorfortigan kurson k kvankam al mnemonikaj ekzercoj mi povis dediĉi nur minimuman tempon, tamen mi estas vere ravita pri la sukceso atingita.

Mia memoro fariĝis nun rapida, daŭra k obeema al la volo; la rapideco de psikaj reakcioj pligrandiĝis, la koncentrigo de l'atento fariĝis vere mirinda k kiel rezulto de ĉio supredirita: treege pliiĝis la produktivo de la laboro.

Permesu, sinjoro, ke per tio ĉi mi esprimu al vi mian varmegan dankon. Mi deziras al vi, ke via bonfaranta metodo trovu siajn adeptojn en kiel eble plej vastaj rondoj de la socio.

Altestime
I. SILBERBERG
studentino de la Supera Instituto
de Komerco en Antverpeno.

Antverpeno, str. Nottebohm No 26
Belgujo.

Internacia Ligo de Virinoj
La Roŝela Sekcio organizinte 3 esp.-kursojn, dez. por gejunuloj k maturuloj **internacian koresp.** – L, PK, PI, Fotojn – Adr.: F. Chamarre, 64, Av. de Metz, La Rochelle.

Por PACO kaj Libero Francio

ENHAVO

	paĝo
Deportiĝo de fremduloj el Usono	195—197
Ŝtutgart, la kongresurbo, en la laborista movado	197—198
Politika k ekonomia vivo en Latvio	198
El Ĉinio	198—199
Letero el Britio	199
Paroloj ne sufiĉas	199
Stranga sinteno de aŭstria sindikato	199—200
Mi volus fariĝi prostituino	200
Mi volas scii	200
La klasbatalo tra la mondo	201
Diskutejo	202
Sennaciula liberpensula paĝo	202—203
Tra Esperantio	204—206

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)